



21-a Jaro N-ro 227-228: Oomoto, KAMEOKA, Kioto-hu, Japanujo. **Majo-Junio 1959**
Abonprezo: ¥ 240 por unu jaro; \$ 0.80 aŭ 12 Steloj por eksterlando: Abonebla
ĉe la Internacia Esperanto-Instituto, Rieuwstraat 172, Den Haag, Nederlando

La Usona garnizonado en Japanujo estas kontraŭkonstitucia

laŭ juĝo de la Distrikta Kortumo de Tokio

La 30-an de marto 1959, Juĝisto Akio Date de la Tokia Distrikta Kortumo difinis, ke la instalado de la usonaj militoperaciaj bazoj en Japanujo estas kontraŭkonstitucia. La difino estas eksplicite farita en la verdikto, kiun li donis rilate la t. n. "Sunagaŭa-incidenton".

La "Sunagaŭa-incidento" okazis antaŭ du jaroj: la 6-an de junio 1957, kiam ĉ. 360 studentoj, laboristoj, socialistoj kaj vilaĝanoj alsvarmis la usonan aerbazon ĉe Taĉikaŭa, en Tokio, kaj obstrukcis la laboron de termezurado de la Tokia Rekvizicia Oficejo, kiu projektis plivastigi la aerbazon ĝis la apuda urbeto Sunagaŭa. La kontraŭstarantaj manifestaciantoj rompis la ferbarikadon kaj transpaŝis la limojn de la tereno por malhelpi la laboron. Okazis kolizio inter ili kaj la policistoj. Nur post forpaso de ĉ. du monatoj 25 laboristoj estis arestitaj kaj sep — akuzitaj.

La revizorejo proponis, ke ĉiu el ili estu punita je ses-monata malliberigo pro ilia entrudiĝo en la aerbazon: ago defia al la preskribo de la Kriminala Speciala Kodo.

Tamen, Juĝisto Date nun verdiktis ilian senkulpecon deklarante, ke la ĉeesto mem de la Usonaj Sekurec-korpusoj en Japanujo rompas la artikolon 9-an de la Japana Konstitucio, kaj ke la Japana-Usona Sekurec-pakto kaj la Administracia Interkonsento, bazita sur la unua, estas kontraŭkonstituciaj kaj, sekve, la Kriminala Speciala Kodo elfarita en ligo kun la Pakto kaj la Interkonsento estas nevalida laŭ la japana leĝo.

La Juĝisto plu diris, ke la Kortumo ne povas lasi sin influi de tia argumento ke la forretririĝo de la Usonaj Sekurec-korpusoj el Japanujo lasus Japanujon en stato de milita vakuo kaj tial ili bezonas restadi en

pli-konvene dirite, la rajton de “parolibereco”, samtempe reprezentante, laŭ ni, la opinion de la granda plimulto de la japana popolo. (En Japanujo, la sendependeco de jura potenco antaŭe estis nur nominala, ĉar kvankam la juĝopovo apartenis al la kortumoj kiel en la nuna konstitucio, ĉiu juĝofaro devis esti plenumita “en la nomo de la *tenno*” aŭ la absoluta regnestro de Japanujo — laŭ la malnova konstitucio.)

Nu senrilate al ĉio, kion ni skribis supre, ni havas alian gravan kazon por informi ĉi tie; ankaŭ por reliefigi per ĝi por niaj legantoj pli bone la fonon de la politika-socia situacio, en kiu la japana popolo sin trovas nuntempe.

Ĝi okazis dum la 30-a Eksterordinara Sesio de la Parlamento: la 8-an de oktobro de la pasinta jaro, kiam la Registaro kaj Liberal-demokrata Partio prezentis, *sen anonco*, projekton por la “plifortiga” amendo de la *Leĝo pri la Plenumado de Policistaj Taskoj*. La Socialista Partio, kiu estas opozicia partio, kaj preskaŭ tuta nacio, kiu havas ankoraŭ la freŝajn memorojn pri la gestapecaj okazaĵoj antaŭ kaj dum la dua mondmilito, ekstaris por abortigi tian projekton. En la Parlamentejo la socialistoj eluzis ĉiajn rimedojn por obstrukci, kaj ekstere dekoj da organizitaj grupoj gvidataj de la Socialista Partio kaj Laboristaj Sindikatoj senĉese daŭrigis manifestaciojn por la nuligo de la amenda projekto tiel, ke la parlamenta proceduro devis esti haltigita. La 4-an de novembro, kiam la sesio paralizita estis finiĝonta nur post tri tagoj, la Registaro kaj Liberal-demokrata Partio manovris per abrupta kaj arbitra anonco pri la 30-taga plilongigo de la sesio. La Socialista Partio tuj bojkotis la sesion kaj denuncis, ke la plilongigo de la sesio estas nevalida. La sekvintan tagon, ĉ. kvar milionoj da laboristoj partoprenis tutlandan manifestacion kontraŭ la amenda projekto, multloke kaŭzante la prokrastiĝon en la servoj trafikaj kaj komunikaj, kiel la fervojaj, tramaj, poŝtaj, telegrafaj ktp. Ankaŭ el la vicoj de sciencistoj, literaturistoj kaj religiistoj — multaj estis alarmitaj kaj publikigis manifeston kontraŭ la “dangera” amendprojekto.

Fine la 22-an de la sama monato, Ĉefministro Kiŝi kiel la prezidanto de la Liberal-demokrata Partio kaj Prezidanto Suzuki de la Socialista Partio kunsidis vidalvide kaj intercedis, ke la amenda projekto estu deprenita, kaj la sesio estu plilongigata. Tiu interkonsento riparigis la situacion kaj oni reprenis la tagordon de la sesio post la 18-taga plena malfunkcio.

Jam la legantoj vidas, ke la Registaro kaj Liberal-demokrata Partio celis per la supre-dirita amendprojekto la plifortigon de polico kaj per ĝi antaŭtempan subpremon aŭ malebligon al la “ribeloj”, kiaj la Sunagaŭa-afero kaj multaj aliaj, kiuj konstante “ĝenas” la registaron.

T. Nakamura

Jasuo Sakurai

Dek Gvidprincipoj de la Oomoto-Movado

(1)

Kio estas Oomoto? Por respondi tiun demandon ni ordinare devus komenci per la historia priskribo de Oomoto. Sed ĉi tie, ni volas respondi ĝin laŭ la Dek Gvidprincipoj de la Oomoto-Movado, koncize formulitaj surbaze de la Oomoto-Kredaro. Ili estas jenaj:

1. Dio kreis kaj animadas ĉion en la universo. La homoj estas fratoj kaj ilia mondo estas unu.

2. Dio kaj la homo ekzistas unu por la alia. Kie okazas la unuigo de Dio kaj la homo, tie ekestiĝas senlima spirita potenco.

3. La ekzisto de la spirita mondo estas absoluta. La homo postvivis sian fizikan “morton” kaj en la eterna vivo daŭrigas la aktivadon.

4. El la mondo estu nuligita la antaŭjuĝo venanta de la diferencoj de religio, ideologio, raso, nacieco, sekso, klaso ktp.

5. Ĉiuj religioj originas el unu Dio; surbaze de tiu vero ili kunlaboru sur tiu tereno de sia misio, kiu estas komuna al ili ĉiuj.

6. Politiko, ekonomio, edukado, artoj kaj ĉiuj aliaj branĉoj de la homa aktivado estu gvidataj laŭ religiaj principoj tiel, ke ili kontribuu en la formado de la ideala homara kulturo de la mondo.

7. Religio rilatas kun scienco, kiel spirito kun korpo. Ambaŭ kune kontribuas por la progresigo kaj

bonfarto de la homaro.

8. Milito kaj ĉiu alia ago de perforto estu malkonfesitaj kaj la armado de nacioj estu abolita.

9. Unu granda homara familio estu fondita per starigo de sistemo de tutmonda organizaĵo, kun nia respekto al ĉiuj naciaj tradiciaj kulturoj.

10. Sub la senlima Amo kaj Regado de Dio la mondo estos “rekonstruita” en la formo ideala, kaj en tiu sankta laboro la homoj dediĉos sin por servo.

Una homara familio

Per la 1-a principo ni komencu.

1. Dio kreis kaj animadas ĉion en la universo. La homoj estas fratoj kaj ilia mondo estas unu.

Oomoto estas religio kaj la oomotanoj kredas la ekziston de unu Dio en la universo. Laŭ Arnold J. Toynbee, mondfama angla historiisto, “Dio” estas absoluta ento aŭ ekzisto vivanta malantaŭ la fenomenoj de la materia universo. Ni opinias, ke multaj el la ateistoj akceptus “Dion”, laŭ tiu difino, aŭ “Dion”, se ĝi estas esprimita per aliaj vortoj, kiel “absoluta ento”, “granda naturforto”, aŭ “granda vivforto” ktp. Sed religie, ni esprimas la samon per “Dio”.

Ĉio en la universo estas kreita, kaj enanimita de Dio. La vorto “animadas” uzita en la originalo signifas *krean progresigon* aŭ *evoluigon*.

La vera Dio estas unu sola ; sekve en la universo ne estas du Dioj. La homaro estas la filoj de Dio kaj la homoj estas fratoj unuj kun la aliaj. Ĉi tiu ideo tute ne estas nova. Ĉiu religio kaj ĉiu alia movado, bazanta sin sur la racio, kaj amo, havas ĝin en si. Ni citos la vortojn, ekzemple, de d-ro Zamenhof, la kreinto de la Internacia Lingvo Esperanto, kiu parolis ĉe la 1-a Universala Kongreso en Boulogne-sur-Mer, 1905, jene :

“En la plej malproksima antikveco, kiu jam de longe elviŝiĝis el la memoro de la homaro kaj pri kiu nenia historio konservis al ni eĉ la plej malgrandan dokumenton, la homa familio disiĝis kaj ĝiaj membroj ĉesis kompreni unu la alian. Fratoj kreitaj ĉiuj laŭ unu modelo, fratoj, kiuj havis ĉiuj egalajn ideojn, egalan Dion en siaj koroj, fratoj, kiuj devis helpi unu la alian kaj labori kune por la feliĉo kaj la gloro de sia familio, — tiuj fratoj fariĝis tute fremdaj unuj al aliaj, disiĝis ŝajne por ĉiam en malamikajn grupetojn, kaj inter ili komenciĝis eterna milito”.

Returte al Dio

Por pruvi la “fratecon de l’ homaro” ni havas interesan matematikan kalkulon. Supozu, ke estas unu homo. Tiu homo havas siajn patron kaj patrinojn ; ĉi tiuj siavice havas du patrojn kaj du patrinojn ; se oni kalkulas laŭ tiu geometria progresio la nombron de la gepatroj, la sumo de la prapatroj antaŭ 10 “gepatraj”

generacioj fariĝas 1,024 ; tiu antaŭ 20 generacioj — 1,004,000 kaj tiu antaŭ 30 generacioj 990,000,000, kaj tiu antaŭ 31 generacioj 1,980,000,000... Estas jam ekster dubo ke la homaro estas kunfratoj.

Oni diras, ke nun estas Kosma Epoko, kiam artefaritaj satelitoj flugas ĉirkaŭ la teron. La mondo estas tiom mallarĝigita, ke ĝi fariĝis kvazaŭ “unu domo”. Tamen, la homaro — trimil milionoj da loĝantaro sur la terglobo ankoraŭ ne povas vivi en unu familio, malpace batalante inter si en diversaj lokoj. Nur se ni povas rekonii la fratecon de la homaro, se ni pensas, diras kaj kondukas laŭ la konvinko, ke la mondo estas unu domo kaj la homoj estas gefratoj, tiam la paco de la mondo nepre venos. Sed el religia starpunkto, ni diras, ke la ideo de la homa frateco ne estas ebla sen rekonii la Patron, kiu estas Dio. Se jam oni povas akcepti la fakton, ke unu homo nun vivanta iam havis 990 milionojn da “gepatroj” en la tempo antaŭ 30 generacioj, kial oni ne povas akcepti la vortojn : *Homo venas de la patro, la patro siavice de la prapatro, la prapatro siavice de la Patro, kiu estas Dio?* Sen rekonii tiun “Dion” la frateco de la homaro en la ĝusta senco de la vorto ne estas realigebla sur la tero.

Se la homoj faros la “kopernikan” sinturnon al Dio, rekonos ĉiuj la ekziston de Dio, kredos en Dio kaj observos ĉion el la loko de Dio, la homaj pensoj kaj kondutoj ŝanĝiĝos radikale por reflekti sin en ĉiuj sferoj

de la homara vivo : politiko, ekonomio, edukado, arto kaj aliaj. Sen tiu “kopernika” sinturno al Dio neniam naskiĝos nova mondo por la homaro. Sen ĝi ĉiuj homaj klopodoj por paco estus kvazaŭ konstrui kastelon sur la sablo.

Sed kio malhelpas la homon rekonii Dion, tio kuŝas en tio ke la

homo ne rimarkas la eraron de sia egoista vivmaniero. Kiam la homo introspektas kaj rimarkas sian kulpon, nur tiam nepre en li estiĝos nova vivo. Do, post ĉio la paco de la mondo devas esti komencita per la reformo de la homa koro kaj lia vivmaniero — laŭ la volo de Dio.

Trad. Pezmezo

Sino D. M. Worcester adiaŭis Japanujon

La 26-an de aprilo 1959 la angla s-anino D. M. Worcester, kiu restis en Ajabe iom pli ol unu jaron kiel gasto de Oomoto, forveturis de la haveno de Kobe al sia hejmlando per la angla turista ŝipego *Himalaya*. Por ŝin adiaŭi en la ŝipo kolektiĝis multaj geesp-istoj kaj oomotanoj el Kioto, Osaka, Kobe kaj aliaj.

Dum sia restado inter ni, ŝi ne nur gvidis laŭ rekta metodo la esp-an kaj anglalingvan kursojn en Ajabe kaj Kameoka, sed ankaŭ ofte vojaĝis tra la lando por varmigi aŭ revarmigi sian amikecon kun japanaj samideanoj. Ŝia vojaĝo ampleksis preskaŭ tutan landon de la nordo, Hokkaido, ĝis la sudo, Kjuŝu, kaj la lokaj samideanoj ĉie ĝojis gastigi ŝin. Ŝia kontribuo por instigi praktikan konvencion de Esp. inter japanaj samideanoj estis netakseble granda. Gaja kaj sprita s-ino Worcester sendube estas unu el la plej gastame akceptitaj alilandaj samideanoj, kiuj iam vizitis Japanujon.

Dek tagojn antaŭ ŝia forveturo, venis al Japanujo alia samideano el Nov-Zelando, s-ro W. Hudson King, kiu estas tre intima

amiko de s-ino Worcester. Ili kune faris rapidan vojaĝon tra ĉefaj urboj de la lando dum 8 tagoj — de Tokio ĝis Hiroŝima, ricevante ĉie gastamajn akceptojn de la lokaj samideanoj.

Samdate ili kune forlasis la landon, postlasante al japanaj samideanoj multajn karmemorojn. La ŝipo *Himalaya* atingos Londonon en la fino de majo. Ĝis revido!

La Red.

La foto montras la adiaŭan kunvenon ĉe la domo de s-ro E. Deguĉi, prez. de Oomoto, Ajabe. Meze sidas s-ino W. vestita en kimono, maldekstre s-ro King kaj dekstre s-ino Naohi Deguĉi (videbla nur parte de la vizaĝo).



GRANDAJ HOMOJ

Kiam oni parolas pri la Grandaj Homoj, oni devas koni, antaŭ ĉio, la vojon, kiun ili iris. Ĉar la Grandaj Homoj estas tiom pli altvaloraj por ni, ke ni povas sekvi ilian vojon.

Kiel komencis la vivo de la Grandaj Homoj en la kosmo?

Antaŭ ĉio, la Grandaj Homoj komencis pensi. La penso desegnis tiujn liniojn, en kiuj la vivo devas manifestiĝi.

Tiel la Grandaj Homoj formas tiun cirkon de la penso, kiu desegnas la limojn de la vivo kaj entenas ĉiujn eblecojn, ĉiujn formojn, en kiuj ili povas manifestiĝi.

Longan tempon perdis la Grandaj Homoj, ĝis kiam ili kreis tiun cirkon de la penso.

Apenaŭ post tio la Grandaj Homoj komencis senti la realecon de sia penso en kiu estas enhavo; per aliaj vortoj, la Grandaj Homoj enmetis en siajn pensojn enhavon.

Kiel rezulto de la intelekta ago de la Grandaj Homoj en la organika mondo aperis la cerbo. Per sia penso la Grandaj Homoj organizis la cerbon.

De la ago de iliaj sentoj, kiel rezulto, aperis en la organika mondo la pulmoj kaj la koro. Parolante pri la koro, ni resume klarigos fakton. Oni scias, ke la koro de la nuntempa homo estas en la maldekstra flanko. La kaŭzo pri ĝi estas, ke en malproksima epoko inter la Grandaj Homoj aperis disdubiĝo, miskompreno. Kelkuj ekiris "maldekstren" kaj la aliaj — dekstren. Kaj ĉar en la komenco la maldekstruloj superis, ili translokigis la koron maldekstren. Tamen, estonte, kiam la Grandaj Homoj en la dekstra vojo

superos en la disvolviĝo de la surtera homaro, — kio jam fariĝas — la homaj pensoj kaj sentoj ree ekvibriĝos kaj la koro reokupos sian normalan lokon.

Kiam en la vojo de la evoluo, la Grandaj Homoj malsuprenvenis sur la teron, por organizi ĝin, ili kreis la stomakon, ĝenerale la digestan sistemon. Ni devas, tamen, diri, ke la malsuprenveno de la Grandaj Homoj sur la tero estis por ili nur epizodo. Ĝi estas la lasta etapo de ilia krea ago en la mondo.

Unue tiuj Grandaj Homoj, tiuj potencaj kreantoj, estis kiel dioj en la nevidebla mondo, kiuj partoprenis en la kreado de la mondo kun ĉiuj ĝiaj stelaj universoj.

Nur kelkuj el ili post fino de la krea ago en la vasta kosmo, malsuprenvenis sur la teron por ĝin organizi kaj ordigi. Post kiam ili ĝin organizis, ili ree revenis en la spiritan mondon. Do, hodiaŭ sur la tero, vere grandaj homoj, kiel ni ilin desegnis supre, troviĝas. Ili estas nur reprezentantoj de la Grandaj Homoj. Ĉiuj, kiujn la homoj nomas grandaj — poetoj, verkistoj, muzikistoj, sciencistoj, politikistoj — estas nur partaj manifestiĝoj de la Grandaj Homoj, iliaj provizoroj preprezentantoj. Kaj kion vere prezentas unu granda muzikisto sur la tero, kiel Beethoven, ekzemple, kompare kun tiuj grandaj, unuaj kreantoj de la universa muziko? Li estas ankoraŭ infano, kiu balbutas, kiu nun lernas la lingvon de la muziko. Tiel same estas en ĉiuj aliaj regionoj el la spirita vivo de la surtera homaro.

Ĉar hodiaŭ sur la tero ne estas kondiĉoj por plena manifestiĝo de la vere Grandaj Homoj, eĉ se ili venus, ili ne povus, ili ne

povus sin plene manifesti. Ĉu Kristo, kiu estas vere granda homo, povis manifestiĝi inter la homoj sur la tero? Ne, li povis manifesti nek milonon de tio, kio efektive li estis, de la amo kaj la prudento, kiujn li portis en sia animo.

Neniu granda homo, neniu el la reprezentantoj de la Grandaj Homoj, kiujn ni romas geniuloj, sukcesis sin plene manifesti sur la tero.

Apenaŭ nun, laŭ la leĝo de la evoluo, kreiĝas kondiĉoj por la manifestiĝo de la Grandaj Homoj sur la tero. Ili de post nun venos sur la tero.

Kaj kiam ili venos, la homo devas posedi viglan intelekton kaj viglan koron por ekkoni ilin. Ĉar la Grandaj Homoj sin mem neniam montras al la homoj, ili neniam elmontras sian grandecon, sian scion. Ili vualas sian klaran lumon per sep vualoj, ĉar ili scias, ke la homoj ne povas elteni ĝian blindigan brilon. La unika maniero, per kiu oni povas igi la Grandajn Homojn sin manifesti estas la amo. Portantoj de la granda dia penso, la Grandaj Homoj manifestiĝas nur al tiuj, kiuj ilin ekkonos kaj ekamos. Tiam ili demetas iom sian sepoblan vualon kaj sendas aron da radioj el sia lumo al la intelektoj kaj la koroj de tiuj, kiuj sukcesis interne sin proksimigi al ili.

Ĝenerale pri la grandaj homoj oni diras, ke ili fariĝis tiaj dank' al la favoraj eksteraj kondiĉoj, aŭ ili naskiĝis tiaj laŭ la leĝo de la heredeco. La grandaj homoj nek fariĝas, nek naskiĝas tiel. La grandaj homoj estas grandaj, ĉar ili asimilis en si la diajn ideojn, enmetitaj en sia spirito kaj en sia animo. Tiuj nome diaj ideoj, asimilitaj de ili, faras ilin grandaj.

Se vi demandas kiel la homo povas fariĝi granda, mi diras al vi la jeron: Se vi komencos asimili en vi la dian ideon, vi jam metas fundamenton de via grandeco. Se vi komencos asimili en vi la dian senton, vi metas en vi fundamenton de

grandeco. La ceteron faros la tempo.

Por ke la homo firmigu en si tiun fundamenton, antaŭ ĉio li devas havi ĝustan penson. La pensoj devas esti absolute difinitaj kaj ne vagantaj fantazioj. Ili devas esti esprimo de la realeco, kaj ne respeguliĝo de fiktivaj ideoj.

Ĉiu sento, kiu naskiĝas en la homo, devas havi malantaŭ si fundamentan penson, kiu ĝin subtenas. Sentoj, kiuj ne havas malantaŭ si fundamentan penson, estas efemeraj.

Do, malantaŭ ĉiu penso devas stari tiu origina principo, kiu ekagis en la vivo. Kaj malantaŭ ĉiu sento devas stari penso. Tiel estas en la Granda Homo.

La Grandaj Homoj distingiĝas per bela trajto: amo al la malamiko. Ili posedas tiun malfacilan arton. Ĉiu Granda Homo havas apartan internan metodon por kondukti al la malamiko kaj li ĝin praktikas.

Malfacila estas tiu arto — ĝi vere estas aplikebla nur de la Grandaj Homoj. Sed tiu, kiu volas fariĝi Granda Homo, devas komenci ĝin pristudi. Parolante pri tiu leĝo — amo al la malamiko — Kristo kategorie diras, ke nur tiam la homo estos simila al Dio, kiu sendas la sunon, la pluvon, sian malsekecon egale al ĉiuj — por bonaj kaj malbonaj.

Amo al la malamiko — ĝi estas nefutebla trajto de grandeco. Ĝi ne estas facile akirebla, sed kiu volas iri la vojon de la Grandaj Homoj, devas pensi pri ĝi, por veni almenaŭ ĝis mikroskopa apliko de tiu leĝo en la vivo.

Kiu volas fariĝi Granda Homo, tiu devas pensi pri la Grandaj Homoj. Ili estas modelo de laboro, firmeco, persisteco, amo al la scio, amo al la vero, al la justeco kaj al la libereco — amo al ili kaj ago por ili.

En malgranda grado ĉiuj homoj sur la tero povas labori kiel tiuj. (Universala Blanka Frataro)

Gramatikaj Kazoj kaj Personoj en la Japana Lingvo (fino)

6. Kio estas "persono"?

Ne sole la angla lingvo pritraktas kiel triajn personojn ĉiujn pronomojn kaj substantivojn, kiuj indikas la personojn krom la parolanto kaj alparolato. Ankaŭ Mario Pei skribas en sia "A Dictionary of Linguistics", ke *persono* estas "la gramatika distingo inter la parolanto, aŭdanto kaj subjekto de parolo", kaj klarigas: "La unua persono indikas la parolanton, la dua persono la personon alparolatan, kaj la tria persono la personon, koncepton aŭ objekton priparolatan".

Ĉu la samo estas aplikebla ankaŭ en la japana? Antaŭ ol studi tion, ni vidu kiamaniere tia gramatika distingo estas indikata laŭ la lingvoj. Ni distingas ĉi tie inter "personoj" kaj "gramatikaj rimedoj por personindiko", kiel ni faris distingon inter "kazoj" kaj "gramatikaj rimedoj por kazindiko".

Diversaj estas gramatikaj rimedoj por personindiko. La latina faras tion per morfologiaj variantoj. Ekzemple, /amare/ (ami) variigas jene laŭ la personoj:

	Sing.	Plur.
1-a Persono	/amo/	/ama'mus/
2-a Persono	/amas/	/am'artis/
3-a Persono	/amat/	/amant/

Ni ĉi tie ekstraktu la komunan parton /am-/ el la ĉi-supraj vortoj apartigante ĝin disde /-o-, -a's, -at, -a'mus, -artis, -ant/. Sed /am/ ne estas vorto memstara. Tial ni devas rigardi, ke la latinaj personoj

indikiĝas per morfologiaj variantoj.

Certaj lingvoj aplikas sufiksojn kiel gramatikajn rimedojn por personindiko. Ekz. la turka lingvo. La turka /sevmek/ (ami) variigas sin jene laŭ la personoj:

	Sing.	Plur.
1-a Persono	/severim/	/severiz/
2-a Persono	/severin/	/severiniz/
3-a Persono	/sever/	/severlen/

Ĉi tie /-er/ estas nomata *aorista* afikso konjugacia, kaj ni povas jene ekstrakti la partojn komunajn:

/-im, -n, -o, -iz, -iniz, -ler/(a)
La komuna parto /sever-/ per si povas formi propozicion, memstare signifante "li amas." Tial (a) estas sufiksoj.

Aliaj lingvoj uzas prefiksojn por personindiko. En la Vai-idionio apartenanta al la Sudan-Gvineo lingvo en Afriko, laŭ L. H. Grais (en la libro jam menciita, p. 152), la verbo /ro/ (diri) varias jene laŭ la personoj:

	Sing.	Plur.
1-a Persono	/ndo (<*mro)/	/muro/
2-a Persono	/iro/	/wuro/
3-a Persono	/aro/	/ando (<*amro)/

Estas demando, ĉu la jenaj nekomunaj partoj estas prefiksoj aŭ ne:

/n- (<*m-), i-, a-, mu-, wu-, an- (<*am-)/(b)

Ĉar al mi mankas lerno-materialo, mi ne povas diri ion certan, sed mi trovas, ke ankaŭ la substantivo /fa/ (patro) varias kiel:

Sing. Plur.

1-a Persono	/mfa/	/mufa/
2-a Persono	/ifa/	/wufa/
3-a Persono	/afa/	/anfa/

Se /ro/ kaj /fa/ estas uzablaj kiel vortoj memstaraj, mi povas supozi ke (b) estas prefiksoj. Estas ĉiu en (b) iel povas havi memstarecon (ekz. pere de akcento k. a.), tiam (b) estus prepozicioj.

La japana lingvo havas nek la konjugacion kiel de la latina, nek la afiksojn kiel en la turka por montri la personojn. Ĝi tamen havas vortetojn, kiuj ludas la rolon similan al tiu de la Vai-idionaj prefiksoj (aŭ prepozicioj). Ili estas la "ĝentilaj" prefiksoj /'o-/ kaj /go-/ , kiuj povas indiki la duan personon por certaj vortoj, kiel: /karada/ (korpo) → /'okarada/ (via korpo); /joo/ (afero) → /gojoo/ (via afero).

Ankaŭ verboj havas duopajn formojn: unuj por la 1-a pers. kaj la aliaj por la 2-a pers.

1-a pers.	2-a pers.
/dekakeru/	/dekakerareru/
/dekakeru/	/odekake ni naru/

Tamen /'okarada/ povas indiki la *korpon* ne sole de la dua persono, sed ankaŭ de la tria. Ekz. ni diras /'okarada/, se temas pri la *korpo* de la tria persono, kiu estas pli-malpli respektata tiel de la parolanto, kiel de la alparolato. Ankaŭ

/karada/ aplikiĝas ne sole al la unua, sed ankaŭ al la dua. Nome:

/karada/	1-a kaj 3-a pers.
/'okarada/	2-a kaj 3-a pers.

kie ambaŭ formoj aplikiĝas egale al la tria persono, kaj ne estas klara limo inter la personoj unua, dua kaj tria. Ĝenerale, kiam la tria persono havas nenian rilaton kun la alparolato, nur tiam oni uzas /karada/ parolante pri la *korpo* de tiu tria persono. Oni uzas /'okarada/ parolante pri la *korpo* de la tria persono, kiam tiu ĉi havas certan rilaton kun la alparolato. Tial mi povas konkludi, ke en la okazo, kie nur la rilato inter la unua kaj la dua personaj (parolanto kaj alparolato) estas evidenta, la parolanto uzas /karada/ por la tria persono konsiderante lin apartenanta al sia flanko, kaj /'okarada/, konsiderante lin apartenanta al la flanko de la alparolato.

Krom tiaj prefiksoj, la japana lingvo havas, kiel rimedojn por personindiko, ankaŭ pronomojn. Precipe personaj pronomoj estas pritraktindaj. La japanaj personaj pronomoj ne nepre estas la "gramatikaj rimedoj por personindiko". Ekzemple, d-ro Yosio Yamada donas jenan "liston de la pronomoj" (Lekcioj pri la Gramatiko de la Japana Parollingvo, Tokio, 1922, p. 38):

1-a Persono	2-a Persono	3-a Persono				
		Difinaj			Nedifinaj	
		Proksima	meza	fora		
watakusi	anata	kore	sore	are	donata dare	Persono
watasi						
(ware)	omae				dore nani	Afero, objekto
(ore)						
(boku)	kimi	koko	soko	asuko	doko	Loko
		kotti	sotti	atti	dotti	
		kotira	sotira	atira	dotira	Direkto

Laŭ mia opinio, tiu ĉi listo estas nombla la klasifiko de vortoj, pli ol nomi ĝin listo laŭ gramatika kategorio. Por personindiko, ni havas krom la pronomoj, ankaŭ jenan rimedon:

/kanai/ (mia edzino)
 /'okusama/ (via edzino)
 /'itadaku/ (mi manĝas)
 /mesiagaru/ (vi manĝas)
 /mairu/ (mi iras)
 /'iraTsjaru/ (vi iras)

Ankaŭ ĉi tie kontraŭstaras, kiel inter /karada/ kaj /'okarada/, supre:

/kanai/ edzino de 1-a kaj 3-a pers.
 /'okusama/ edzino de 2-a kaj 3-a pers.

Nun ni konsideru la okazon, kiam mi parolas al sinjoro Q pri la edzino de mia kara amiko K. Laŭ la konsidero pri la soci-psikologia rilato decidiĝas, kiun el /kanai/ kaj /'okusama/ mi ĉi tie uzu. Mi diras /kee (K) no kanai/ (edzino de

K), kiam mi parolas pri ŝi konsiderante ŝin aparteni al mia flanko (tiam S-ro Q estas soci-psikologie en distanca rilato al K), sed mi diras /keekuN²⁰ no 'okusama/, kiam mi parolas pri ŝi konsiderante ŝin aparteni al la flanko de s-ro Q (tiam s-ro Q kaj K estas en proksima rilato soci-psikologie). Plie ekzistas /gusai/ (mia edzino), sin-humiliga vorto, kiu estas uzata ekskluzive por la unua persono.

Similan klarigon ni povas doni ankaŭ al /'itadaku/ (mi manĝas) kaj /mesi'agaru/ (vi manĝas):

/'itadaku/ por 1-a kaj 3-a pers.
 /mesi'agaru/ por 2-a kaj 3-a pers.

Plie, ni havas /taberu/ (manĝas), kiu rilatas same al la unua, dua kaj tria personoj.

Nun ni povas klasifiki la lingvistikajn rimedojn por personindiko unue en la du grupojn: 1) gramatikaj rimedoj kaj 2) vortaj rimedoj. La 1) dividiĝas en

konjugacion, afiksojn kaj prepoziciojn aŭ postpoziciojn, dum la 2) en pronomojn kaj ceterajn vortojn.

- 0 Gramatikaj rimedoj
- 00 Konjugacio
- 01 Afiksoj
- 09 Prepozicioj, postpozicioj
- 1 Vortaj rimedoj
- 10 Pronomoj
- 11 Ceteraj vortoj.


7. Japanaj personaj pronomoj.

Kian rilaton havas glose la personaj pronomoj japanaj? La sistemo de tiuj glosoj devas esti prezentebla kiel listo de pronomoj.

Multaj gramatikoj, inkluzive de tiu de d-ro Yamada, enlistigas en la pronomojn por la tria persono "kore, koko, ... sore, soko, ... are, asuko (asoko), ... dore, doko ...". (Ĉi homo; ĉi loko... tiu homo, tiu loko, ... tiu fora homo, tiu fora loko... kiu homo, kiu loko, ...) Nun ni studu pri ĉi tio. "kore" kaj "koko" indikas ion ĉe la loko de la parolanto. Sekve per /koicu/ ni indikas la trian personon, asociigante lin ĉe mia flanko: "sore" "soko" ktp. indikas ion ĉe la loko de la alparolato, dum "are", "asuko" ktp. estas uzataj por indiki ion for de la loko kaj de la parolanto, kaj de la alparolato.

Tial uzeblas por la "temo de parolo" ĉiu el /ko-/, /so-/ kaj /'a-/. Por la partoprenantoj en interparolo ni havas /watasi/ por la parolanto, kaj /'anata/ por la alparolato, sed nenion ceteran. La grafik-aĵo, en kiu la unuan personon prezentas /watasi/ kaj la duan, /'anata/, prezentas la rilaton inter ĉi ambaŭ.

Kie do devas esti "dore" (kiu), "doko" (kie), ktp? Ili korelative rilatas al unu el /ko-/, /so-/, /'a-/ kaj /'anata/. Tamen ili neniam rilatas kun /watasi/. Por tiu signifo /watasi/ estas haĉita en la grafik-aĵo.



Notoj de l' tradukinto:

(¹) kaj (²) rilatas al la antaŭa numero.)
¹) D-ro Hasimoto klasifikas ĉiujn vortojn en du grandajn grupojn: unu grupo estas de la memstaraj vortoj kaj la alia, de la dependaj. Al la unua apartenas la vortoj, kiuj per si mem formas frazparton aŭ propozicielementon. La vortoj de la dua formas propozicielementon nur en akompano al, aŭ kune kun la unua, sed neniam per si mem. Ekz., en "Tuyoi kaze ga huku" (Forta vento blovas), tuyoi (forta), kaze (vento) kaj huku (blovi) apartenas al la unua, sed ga (kazpartikulo aŭ postpozicio, indikanta, ke la antaŭiranta vorto estas nominativo) apartenas al la lasta.

²) Neniu el la japanaj postpozicioj interligas senpere du substántivojn, sed ĝi staras ĉiam inter substantivo kaj vorto, aŭ propozicio, kiu esprimas staton, agon, kvaliton ktp, de la unua: gakkô e yuku (iri al la lernejo), gakkô to hanasiau (interkonsiliĝi kun la lernejo); gakkô kara tûti suru (komuniki de la lernejo). Por ligi du substantivojn en reciproka interrilato, nepre necesas meti /no/ post la postpozicio, kiu siavice staras post la unua substantivo. Do, /no/ kun la postpozicio formas duopan kvazaŭpostpozicion: gakkô eno tûti (al-lernej-a komuniko); gakkô tono hanasiau (kun-lernej-a interkonsiliĝo); gakkô karano sirase (de-lernej-a komuniko).

³) "n" konsistigas unu silabon.

Pri mondvojaĝo de s-ro E. Ito

Koncerne la vojaĝon de s-ro E. Ito kiel delegito de Oomoto al Eŭropo ni publikigis anoncon dufoje en nia revuo. De tiam ni ricevas multajn eĥojn favorajn por lia vojaĝo el diversaj landoj en Eŭropo. Ni ĉi tie esprimas korajn dankojn al tiuj gastamaj samideanoj.

Niaj klopodoj por akiri pasporton por lia vojaĝo progresis bonorde kaj ni jam estas preskaŭ tute certaj pri nia sukceso tiurilata.

Laŭ la nuna plano s-ro Ito forflugos en julio al Kopenhago kaj de tie sin turnos al Varsovio. Post la Kongreso li ĉeestos la Svedan Someran Semajnon kaj la Jarkunsidon de la Mondasocio de

Mondfederalistoj, kiu lasta okazos 17-22, aŭg. en Nederlando. Lia prelegovojaĝo en Nederlando okazos 10 tagojn de la komenco de septembro, en Finnlando ĉirkaŭ 2 semajnojn en la mezo de septembro, kaj en Svedujo, Norvegujo, Danlando entute 1 monaton de oktobro. En novembro li eniros Anglujon, kie li restos 1 monaton kaj en decembro li vojaĝos al sudeŭropaj landoj kiel Jugoslavujo, Italujo, Hispanujo, survoje vizitante kelkajn lokojn en Svisujo. Aŭstrujo k.a.

Kun anticipa danko pro la helpoj kaj gastigoj donotaj al s-ro E. Ito, ni salutas al niaj karaj legantoj.

La Red.

La Funebra Virino

Vespero. Post unu minuto — la oka. Mi sidas en la kafejo kaj skribas. Mi skribas la lastajn vortojn, lastfoje en mia vivo.

Kaj miras mi, ke en tiu malbonaŭgura momento mi volas ankoraŭ skribi. Antaŭ mi sur la tableto staras duonmalplenigita botelo de likvoro; tio, kio en ĝi restis, devas nenigi en mi tiun panikan timon antaŭ tio, kion mi intencas fari... tiufoje jam senhezite.

En la kafejo estas, kiel kutime, gaje kaj svarme. Bruado kreskas. Ĉiuj tabletoj okupitaj. Kiel kutime, kiel ĉiutage...

Tie... ĉe tiu tableto la du pliaĝaj sinjorinoj kun la malmodernaj ĉapeloj kliniĝis al si, kiel kutime, kaj flustras ion kunverve, misterece... Iliaj manoj rememorigas al mi la helicojn de vent-muelejoj dum forta vento. Tie ĉe la najbara tableto la griziĝinta sinjoro en hela jako surmetis la piedon sur piedon, kiel kutime, kaj alumetumas senceremonie en siaj dentoj. Abomena, aĉa snobo.

Kaj tie, iom pli malproksime la sorĉa platenhara blondulino apogis, kiel kutime, siajn nudajn brakojn sur la tableton kaj, kunplektinte siajn longajn flegitajn fingrojn de profesia painistino, ĵetas fojfoje elsub longaj siaj palpebroj la oblikvajn ekrigardojn sur iun, kiu jam delonge malatente ŝin ignoras.

Ho ci mizera, longefingra kaj nigre-palpebra najado. Kiel vi estas seniluziiginta kaj sola!

Ĉiam la samaj tipoj, la samaj vizaĝoj...

Kaj inter ili — mi... perdita sur misvojoj de la vivo, soleca, al neniu

bezona homo.

En la alkoholvaporoj, en la akompano de la fremdaj kaj indiferentaj por mi homoj mi serĉas la forkuron de mia soleco kaj de rememoroj.

Dum longaj, longaj jaroj mi delogadis min, ke mi iam sukcesos kunligi kun tiuj homoj ian ajn kontakton.

Vane.

Kaj jen fine venis la benita rekonsciigo.

Mi sukcesis jen konsciigi al mi, ke nenio kunligas min kun tiuj homoj kaj kunigi ne povas.

Mi estas jam tute viv-elĉerpita. La lasta kunlig-fadeno inter mi kaj vivo estas krevinta.

Urĝas jam fini tiun vivparodion kaj interrampadon de altrudemulo inter piedoj de homoj vivivaj.

Ĉar tiuj ĉi homoj vivas. Ĉiuj tie ĉi kunvenintaj — tiuj du sinjorinoj kun la malmodernaj ĉapeloj, la snobo kun la alumeto en dentoj, la platenhara blondulino — jen la homoj vivaj... La veraj, ĉiutagaj homoj. Ili havas senĉesan kontakton kun vivo. Tio estas tre grava... plej grava en la vivo.

Tiuj homoj scias por kio ili vivas kaj kion kezonas ili de la vivo. Ili deziras vivi — ĝi estas senduba. Ili vivas kaj ĝojas sian vivon. Kiaj ili estas feliĉaj... tiuj grizaj, simplaj homoj!

Ĉiu malsukceso, ĉagreno ĉiu, ĉiu klopodo esperigas ilin, ke iel ajn tamen estos. Forpasos la malbono kaj ree ĉio estos bonorda.

Kaj ĉia sukceso, ĉia eĉ plej efemera ĝojeto donas al ili la benatan iluzion, ke

tiel jam estos por ili ĉiam.

Jen en kio enas la ĉefsenco kaj impulso de vivo.

Kiu tiel pensas kaj tiel kredas — tiu vivas. Vivas per vivpleno. Kaj estas feliĉa — almenaŭ tiel ŝajnas al li.

Al mi jam nenio ŝajnas. Eĉ tiun efemeran iluzion forrabis de mi la damninda sorto.

Mi manĝas, trinkas, lastatempe eĉ verkas (oni presigas kaj pagas), mi vizitas la teatron, kinejojn, drinkejojn kaj kafejojn, mi ridas, diskutas, eĉ pensas.

Tio signas, ke mi vivas...

Sed samtempe mi estas konscia, ke mi trompas senhonte min mem kaj miajn t.n. homfratojn, kvankam ili — tiuj miaj homfratoj tute malatentas min kaj mian trompadon. Mi scias sen plej eta dubombreto, ke mi nur vivimitas kaj penas trovi en tiu misa mistifiko ian memkontenton.

Kompreneble — vane. Kiel kutime.

En mia animo — tie, kie ĉe homoj vivaj kaj la vivon dezirantaj flamas tiu vivdona fajreto de vivdeziro — etendiĝas nun netrapenetrebla cindrotavolo, tiriĝas dezerta mort-malpleno. Nenia forto estas sukcesebla estigi en tiuj mortaj cindrejoj eĉ plej etan vivofajrereton.

Mi neniam supozis, ke oni povas ofte vivi, nenion komunan kun vivo havante.

Montriĝas, ke la afero de kompreno — "la viva kadavro" posedas sian profundan motiviĝon.

Tempas jam, por fari difinitan finon al tiu mistifiko. Hodiaŭ tie ĉi, en la kafejo, en akompano de tiuj gajaj kaj vivaj homoj mi faros la finon...

Ĉi-foje jam nerevokeble. Nenio povos malhelpi al mi...

Por vivi, por partopreni senkompro-mise la vivon, oni devas necese plenumi tri plej ĉefajn vivokondiĉojn:

1. Oni devas malestigi, dispisti je

pulvoro ĉiajn ĉenerojn de la damninda ĉeno, kunliganta kun la estinteco kaj kun ĝiaj fantomoj.

2. Oni devas necesege kredi je vivo, kredi ĝis lasta vivmomento. Kaj se ne je vivo — oni devas kredi je io ajn...

3. Kaj oni devas decide ekami iun en tiu vivo aŭ almenaŭ ŝajnigi, ke oni ekamas...

Kaj mi jam nenion kaj al neniu kredas kaj neniun scipovos ekami.

Anstataŭ vivi per estanteco kun la kredo je la tago morgaŭa — mi vivas per damninda mia estinteco kaj per inkubo de teruraj rememoroj el la pasintaj tragediaj tagoj.

Ho ci — belega platenharulino kun longaj palpebroj kaj fingroj! Mi volas vin peti pri io:

Kiam neatendata paf-eksplodo kons-ternos ĝisprofunde viajn korojn, kaj mi falegos kun disbatita kapo subtablen — plenumu mian volon.

Oni diras ke la volo de mortanto estas sankta. En la maldekstra poŝo de mia jako vi trovos, karulino, la monon. Kiom da ĝi troviĝas en mia poŝo — mi ne scias, sed tiu mono certe sufiĉos al vi por biletaĉeto kaj por via persona rekompenco. Jam hodiaŭ — vi havos la trajnon je la 12-a 30 minutoj. Vi sidigos vin en la unuaklasan kupeon kaj veturos al Walbrzych. Kaj kiam vi jam alveturos — demandu la unuan renkontotan preterpasanton:

— Kie loĝas sinjorino Nadja Damninda?

Vi iros al ŝi kaj diros:

— Sinjorino Damninda! Via eksedzo ne sukcesis elporti la turmentegon de vi al li faritan per via perfido kaj fidelrompo. Hieraŭ je la horo... ne forgesu memor-fiksigi tiun horon, karulino... li ekpafis en sian kapon en ĉeesto de ni ĉiuj. En la lasta momento li ĵetis sur vin la anatemon!

Diru al ŝi:

Estu damnita, Sinjorino Damninda!
En la nomo de via edzo mi damnas vin,
damnindulin!

Kaj poste revenu, kiel eble plej rapide,
al Gliwice kaj al la kafejo.

Mi iras memore en la pasintajn miajn
tagojn, kiam mi ankoraŭ vivis kaj penis
solvi la eternan, nesolveblan dilemon:

Ĉu memmortigo estas heroeco aŭ
malheroeco?

Pasadis la jaro. Vane mi penis trovi je
tiu terura demando logikan respondon.

Subite nun... en la lastaj momentoj de
mia vivaĉo mi sukcesis trovi la serĉatan
respondon:

La homo, en kiu flamas la vivdeziro,
la homo, kiu volas vivi, kiu determinas
sian ekzistadon per difinata celo, la homo,
por kiu la vivo prezentas netrapaseblan
sorĉon, sed malgraŭ ĉio kiu pafas en sian
kapon per la ŝtelita for de malsobra sia
amiko-policisto revolvero, ĉar li ektimis
subite la klopodojn kaj malhelpaĵojn
amasigitajn sur liaj vivovojoj al lia celo
kondukantaj — jen malheroo.

Aĉa malinda malheroo. Li ektimis,
idioto, la vivon, kaj jen paf-dispistis sian
sencerban, stultiĝintan kapaĉon.

La sangitan lian korpon oni forĵetu al
porkoj por manĝado.

Iu, kiu certan tagon konstatis kun la
paliĝinta vizaĝo, ke lia vivo ne plu jam
estas vivo, sed io, kio ŝanĝiĝis en unu
nepaseblan psiktorturon kaj senesperan
enuegon, ĉar iu damninda, ia damninda
walbrzycha Nadja estingis por ĉiam en
lia animo tiun, tiel necesan por vivado,
viv-flameton — tiun vivoĝojon kaj vivde-
ziron kaj dronigis lin en la senfundajn
abismojn de ekzist-senceleco, kiam ĉia
penso, rememoro ĉia enbatigis en lian
de la doloro frenezigiĝintan cerbon per
venena pintakraĵo, kaj ĉiu pasinta tago
ekstaras morgaŭ en larmantaj okuloj
per la rememoro de inkubo — tiu, pafanta

en sian kapon per revolvero aŭ tranĉante
per razilo siajn vejnojn — jen heroo!

Granda heroo. Heroo kaj martiro en
unu persono.

Li komprenis finfine, ke plua vagado
sur la viv-misvojoj, sur kiuj li havis
nenion jam por trovi aŭ perdi — estus
plej hontinda malheroeco.

Li tion komprenis kaj per tuta forto
de sia volo kaj logiko li travenkis en si
tiun malbonaŭguran timon antaŭ la
Nekonata tie... post la tombo.

Li travenkis la timon antaŭ agoni-
doloro.

Kaj mi? mi? Mi — heroo aŭ malheroo?

Mi — malheroo! Fia, malinda mal-
kuraĝulo! Ĉar mi jam delonge adiaŭis
mian vivon, kaj timas la morton!

Anstataŭ malvarma-sange almeti la
malvarman ŝtalon de revolvero al mia
kranio kaj laŭ reguloj de ĝusta pafado
ektiri la ĉanon — mi jen enverŝadas en
min la likvoron kaj penas, oni ne scias
por kio kaj je kio, ebriule filozofadi.

Sufiĉe! Sufiĉe!

Svarme kaj amasplene estas hodiaŭ
en la kafejo. Kvankam ĉiam la samaj
tipoj, la samaj vizaĝoj...

Des pli bone...

Kvankam... kvankam ne...

Kiu estas tiu funebra virino? Tia
nigra? Tuta en la funebra krepo, en la
nigra, longtrena robo. Sur la vizaĝo —
nigra vualeto.

Kiel mirige: la malĝoja, funebra
sinjorino en la svarma kaj gaja kafejo.
Ŝi sidas tie... tia fiera, trankvila, sen-
mova...

Eĉ ne ektremis.

En tiu sia malmovo estas io konsterna.

Sed ĉu tio estas por mi grava? Post
kelkaj minutoj mi jam mortos kaj ĉiaj
aferoj de tiu mondo, ĉiaj funebraj sinjor-
inoj kaj damnindaj Nadjaj ĉesos por mi
ekzisti.

Miaj momentoj estas jam kalkulitaj.
Ho kiel peziĝis subite tiu... revolvero.
Ŝajnas, ke ĝi kreskas en mia poŝo,
fariĝas... kanono. Post kelkaj sekundoj
el tiu kanono falegos en mian kapon la
tondro.

Unu... du... tri...

Adiaŭ... ci stulta, senespera mondo...
Kio jen?...

La nigra sinjorino, la mistera sinjorino
en funebra krepo malrapide leviĝis de
sia sidloko.

Per kvietaj paŝoj plenaj de meriteco
kaj gravo ŝi proksimiĝas al mi. Kaj kiel
estas timige kaj strange samtempe, ke
neniu ekatentas ŝin, kvazaŭ ŝi ne ekzistus
entute.

Sed mi ja scias, mi konscias, ke ŝi
estas, estas... konkreta, viva, tuŝebla...

Ŝi estas jam apud mi... mi ŝajnigas,
ke mi ŝin ne vidas, ke mi ignoras ŝin,
kvankam mi bone scias, ke ŝi ankaŭ scias
pri mia ŝajnigado.

Kion ŝi volas de mi?

.....

En la sekvinta tago...

Estas jam la oka matene. La belvetera,
decembra mateno plena de frosto kaj
suno. Mi sidas en mia ĉambro kaj
atendas.

Mi scias, ke ŝi venos. Certe venos.
Kaj alportos al mi la promesitan trankvil-
igon kaj forgeson. Post unu horo. Je la
naŭa. Mi estas konvinkita, ke ŝi ĝistenos
sian vorton. Ŝi ĉiam ĝistenas...

Tempas, tempas...

Ĉio ŝajnas al mi ia inkuba sonĝo.

Sed ĝi ja estis nenia sonĝo. Ĝi estis
reala, kvankam tiel malbonaŭgura efe-
ktivo.

Hieraŭ, tie en kafejo mi estis ebria,
duonkonscia... mi havis la dolĉon de
likvoro en buŝo kaj fajron en kapo.

Hodiaŭ mi estas tute sobra. Mi ne
havis en buŝo eĉ guteton...

Akurate je la naŭa alvenos al mi mia
nigra, funebra sinjorino kaj alportos al mi
trankviligon.

Kaj tiel estas al mi nun bone, tiel
kviete kaj ĝue en animo. Nenia timo.
Tio okazis hieraŭ. Mi bone memoras
tiun malbonaŭguran, plenan de turmento
kaj teruro momenton, kiam mi jam estis
ekpafonta en mian kapon. Ŝi proksimiĝis
al mi... ŝi... la nigra kaj mistera sinjor-
ino en la krepo — forte min brakumis
kaj ekflustris. De ŝia flustro ekspiris al
mi ia malvarmo, la alkoholvaporoj mal-
aperis senpostsigne.

— Tio, kion vi volas fari, estas plej
granda stultaĵo kaj egoismo...

— Kiel vi eksciis, la nigra sinjorino,
kion mi intencas fari?

— Mi scias ĉion... antaŭ mi estas
neniaj misteroj... — ekflustris ŝi kliniĝ-
ante antaŭ mi kaj respirante sian glacian
buŝ-ekbloveton.

— Kion vi volas de mi? — demandis
mi denove, plena de maltrankvilo kaj
konsterno. Ŝi kapteprenis min forte,
regeme je la brako:

— Mi alportas al vi kvietigon kaj
forgeson — fluŝis ŝia flustreto — iru kun mi.

Mi ne estis en la stato rezisti ŝian
postulon. Ni eliris ambaŭ el la kafejo.

Kaj kiam ni troviĝis en mia soleca
loĝejo mi kuraĝis demandi ŝin klinante
antaŭ ŝi mian humilan frunton:

— Kiu vi estas, sinjorino, vi, kiu legas
miajn pensojn kaj enpenetriĝas miajn
animprofundojn?

Senvorte ŝi levis sian nigran, kiel nokto,
krepan vualon. Kaj tiam mi eksentis, ke
tuta mia estaĵo ŝanĝiĝas en unu ŝtoniĝ-
intan glacibulon.

Tio estis... Ŝi.

Ĝuste tia, kia oni pentras ŝin por
timigo al infanoj kaj naŭvuloj de nia
mondo:

La senhara kaj ostara, klakanta per la

ripoj ŝi rigardis min per nigra malpleno de siaj krepuskaj okulkavoj kaj montradis al mi siajn ĉevalajn dentojn.

Elsub ŝia robrando ornamita per krepuske-nigra krepo vidigis la blankaj kaj terurige sekaj tibioj.

— Mi alportas al vi eternan kvietigon. Vi pravas — en tiu vivo vi havas nenion jam por serĉi.

Sed sciu, ci — plej granda stultulo kaj egoisto, ke krom ci estas ankaŭ la aliaj, kiuj havas ankoraŭ en vivo ion por serĉi. Kaj kredas en ĝian celecon kaj sencon.

Tiuj, kiuj sentas ankoraŭ en si la vivoĝojn kaj havas por tiu ĝojo la planan rajton...

Kiarajte ci, je ies nomo ci bezona jam por neniu homo, volas difekti al tiuj feliĉuloj ilian vivoĝojn?

Kiarajte volas ci per hororo de la memmortiga pafo kaj per vidaĵo de sanga

agonio eksemi en iliaj animoj la kons-
ternon kaj forpreni de ili la iluzion —
vivoĝojn kaj vivdeziron?

Ne tie, sed tie ĉi...inter tiuj kvar
priskrapitaj muroj de via solulejo adiaŭos
vi la iluzion kaj sencelecon de via viv-
ekzisto.

Morgaŭ, je la naŭa laŭ via surtera
tempomezuro, mi venos al vi kaj por vi.

Kaj mi alportos al vi tiun vian eternan
kvietigon kaj forgeson. Atendu min...

.....
Mi atendas. Post kvin minutoj — la
naŭa. Ŝi venos... certe.

.....
Ŝi venis!!!

Staras jen ĉe mi kaj alridetas al mi
amike, bondezire... Venis tiu mia funebra,
nigra kvietigo.

Fine...
Mi foriras de tiu mondo... tute sobra.

Listo de japanaj urboj nove mondanigitaj

(134) Macujama-ŝi, urbo en Ehime-ken, 15 Dec., 1958. (135) Takahaŝi-ŝi, urbo en Okajama-ken, 18 Dec. (136) Morioka-ŝi, urbo en Iŭate-ken, 20 Dec. (137) Nanacuka-
maĉi, urbeto en Iŝikaŭa-ken, 21 Dec. (138) Marugame-ŝi, urbo en Kagaŭa-ken, 23 Dec. (139) Goboo-ŝi, urbo en Ŭakajama-ken, 23 Dec. (140) Kaŭaniŝi-ŝi, urbo en Hjoogo-
ken, 1 Jan. 1959. (141) Oĉiai-maĉi, urbeto en Okajama-ken, 14 Jan. (142) Mijoŝi-ŝi, urbo en Hiroŝima-ken, 3 Marto. (143) Oouĉi-maĉi, urbeto en Kagaŭa-ken 6
Marto. (144) Murakami-ŝi, urbo en Niigata-ken, 9 Marto. (145) Jura-maĉi, urbeto en Ŭakajama-ken, 14 Marto (146) Manno-maĉi, urbeto en Kagaŭa-ken, 16
Marto. (147) Hirose-maĉi, urbeto en Ŝimane-ken, 16 Marto. (148) Akicu-maĉi, urbeto en Hiroŝima-ken, 17, Marto. (149) Kumamoto-ŝi, urbo en Kumamoto-ken, 19
Marto. (150) Mijajima-maĉi, urbeto en

Hiroŝima-ken, 19 Marto. (151) Mihama-
maĉi, urbeto en Ŭakajama-ken, 19 Marto. (152) Oozu-ŝi, urbo en Ehime-ken, 20
Marto. (153) Izumo-ŝi, urbo en Ŝimane-
ken, 20 Marto. (154) Iŭate-maĉi, urbeto
en Iŭate-ken, 20 Marto. (155) Konda-
mura, vilaĝo en Hjoogo-ken, 23 Marto. (156) Innoŝima-ŝi, urbo en Hiroŝima-ken,
24 Marto. (157) Ootake-ŝi, urbo en Hiroŝima-ken, 24 Marto. (158) Kamaŝi-ŝi,
urbo en Iŭate-ken, 24 Marto. (159) Ŝiratori-maĉi, urbeto en Kagaŭa-ken, 25
Marto. (160) Mijako-ŝi, urbo en Iŭate-ken,
27 Marto. (161) Kaŭabe-maĉi, urbeto en Ŭakajama-ken, 31 Marto. (162) Goŭdo-
maĉi, urbeto en Gifu-ken, 10 Aprilo.

Tri perfektujoj mondanigitaj: (7)
Hiroŝima-ken, 18 Marto, 1959. (8) Tottori-
ken, 20 Marto. (9) Kumamoto-ken, 21
Marto.

“Parenciĝo” de Japanaj Urboj kun Eksterlandaj Urboj por la frateco kaj kulturŝanĝo de la urbanoj

Dum la Japana Movado por
Mondfederacio progresas kun la aliĝo
ĝis nun de pli ol 160 urboj jam
“mondanigitaj”, la forta deziro de
japanoj por mondpaco fruktigas
ankaŭ en la alia relative nova formo
de “parenciĝo” de japanaj urboj kun
eksterlandaj urboj, kiel, ekzemple, la
jam kontraktitaj kazoj de Kioto kun
Parizo kaj Bostono, kaj de Osaka
kun San-Francisko, por reciproka
frateco kaj interŝanĝo de industrioj
kaj kulturoj.

De antaŭ duonjaro, tia “parenci-
iĝo” inter la okcident-germana urbo
Augsburg kaj du japanaj mondanig-
itaj urboj, nome, *Amagasaki* (Hjogo
pref.) kaj *Nagahama* (Ŝiga pref.)
estis antaŭenpuŝata de la Germana
Ĉefkonsulo en Kobe kaj la Prezidanto
de la japana industria kompanio
Yanmar Diesel en Osaka. Kaj en la
lasta tempo, kiam s-ro Müller, la

urbestro de Augsburg, vizitis nian
landon, la kontrakto pri parenciĝo
estis subskribita de la tri urbestroj:
la 7-an de aprilo ĉe Amagasaki kaj
la 11-an de aprilo ĉe Nagahama,
respektive. La popolo de la du japanaj
urboj bonvenigis la germanan urb-
estron kaj ovaciis la okazon.

Augsburg, situanta en la sudo de
Okcidenta Germanujo, estas malnova
historia urbo konata ankaŭ kiel la
naskiĝloko de Mozart kaj Diesel, kaj
nun estas centro de industrio kaj
kulturo.

Ankaŭ Nagahama estas historia
urbeto, nun kun ĉ. 47,000 loĝantoj.
Ĝi situas apud Lago Biŭa, la plej
granda lago en la mezo de Japanujo
kaj fama pro produktado de teksaĵoj
el silko kaj veluro.

Amagasaki estas tre fama kiel
pez-industria urbo, apud Osaka, kun
pli ol 350 miloj da loĝantaro.

La urbestroj
de Augsburg
kaj Amagasaki
subskribas la
kontrakton pri
“parenciĝo” de
la du urboj, ĉe
la Kulturdomo
de Amagasaki.



Japanaj Vortoj en Eŭropaj k. a. Lingvoj

—Kun fremdvortoj en la japana— (*Daŭrigite*)

Inversa etimologio pri *biombo*

S-ro Ísmael Gomes Braga, Rio de Janeiro, Brazilo, bonvolis sendi al ni kopion de l' artikolo pri *biombo* el la Vortaro de Laudelino Freire. Tiu sama teksto jam aperis sur p. 32 de n-ro Jan-Feb. Sed pri la opinio en ĝi citita, nome, tiu de Cândido de Figueiredo: "Eble el la japana *biôbu*, se ĉi tiu ne estas importita el la portugala", s-ro Braga komentas, ke la subpropozicia supozo "estas malsaĝa, ĉar se la japanoj estus importintaj la vorton el la portugala lingvo aŭ el la hispana, ĝi devus havi alian originon por la hispanoj kaj portugaloj, sed ĝi neniel havas originon en okcidentaj lingvoj. Sekve li diris stultaĵon".

Nur nun mi rememoris la stultaĵon laŭ informo de s-ro K. Matuba, ke iu portugalo partopreninta unu vesperon en radio-programo de NHK (Japana Brodkasta Asocio), citis kelkajn portugalajn vortojn "japaniĝintajn", inter ili ankaŭ "bjôbu el *biombo*"! Ĉu je tia "ĉaro-antaŭĉevaligaĵo" kulpigis la "stultaĵo" supre montrita? Se jes, stultaĵo estas danĝera kvazaŭ kontaĝa malsano¹⁾. S-ro Braga konkludas: "La vorto BIOMBO estas tiel japana kiel QUIMÃO, QUMONO<kimono>".

Japanino × Blankulo

Kiom da legantoj, tiom da gustoj. Unu nia leganto (kies nomon ni rezervis por ni) interesiĝis je antropologia aspekto de l' afero, kiun mi menciis sur p. 186 de O., 1958. Li skribas:

"Mi konstatas laŭ via teksto, ke la

japaninoj ne timis la barbegojn de tiuj portugaloj kaj kuniĝis kun ili. Sekve ne nur vortojn tiuj viroj lasis en la malproksima insularo antaŭ 400 jaroj, ili certe lasis ankaŭ idojn. Kiaj aspektus nun la idoj de tiuj portugaloj? Ĉu ili reakiris la difinitan aspekton de la patrinoj aŭ de la patroj? Certe la temo interesus la studemajn antropologiistojn. Eble ekzistas ankoraŭ en Japanujo belaj geĵoj el tiu origino...".

Nu, ŝajnas, ke la temo interesos ne sole la studemajn antropologojn. Kvankam mi ankoraŭ neniam vizitis la sudinsulon por pristudi la fizionomian aspekton de tiuj amindaj miksedvenuloj, tamen mi vidis plurajn portretojn naturkolorajn de tiaspecaj knabinoj — ne de la t.n. "log-ravaj" specoj, sed de l' ordinaraĵoj virgaj tipoj — kiuj ilustris foto-paĝojn de gazeto. Kiel tiaj, ili portis ne nur apartan ĉarmon, ne nur eĉ la valoron de iaj "murornamaj knabinoj", sed ankaŭ sentrompe perfidatan nuancon da "ekzotika" tono, kiun ni tuj rimarkis en kaj ĉirkaŭ la okuloj kaj precipe laŭ la nazaj profiloj. Sed kiu el ni povus diri ĉu iliaj prapatroj estis portugaloj, hispanoj, holandanoj aŭ angloj! Oni diras, ke — kiel nia amiko konjektis — geĵoj "el tiu origino" nedifinebla ankoraŭ estus troveblaj en Nagasaki kaj aliloke.

Hodiaŭ tia pariĝo, heterogena almenaŭ haŭtkolore, ne plu estas troe abomenata. (Ne temas ĉi tie kaj ĉi sube pri laŭleĝa geedziĝo miksrasa, kiu ne estas malestiminda, nek estas malestimata; ĝi eĉ fariĝis, kvankam nur iomete, populara kiel postmilita socia fenomeno.) Sed antaŭ kelkaj jarcentoj kaj en la provinca insularo

izolita for de l' okcidenta mondo, tia kuniĝo — krom la fakto ke la Tokugaŭa-registaro estis dekretinta la malpermeson de "miksdezigi" kun blankuloj — estis komune rigardata kiel io "besta" kaj eĉ meritis ostracismon. (Estas notinde, ke la japanoj bezonis ankoraŭ ducent jarojn antaŭ ol ili estos civilizitaj (?) sufiĉe por lerni kiel manĝi bovaĵojn kaj, lerninte, kuiras kaj manĝas ĝin ne en ĉambro, sed ĉiam eksterdome — sur la korto — por eviti la "malpurigon" de ilia loĝejo pro la bestodoro.)


Mi jam menciis, ke en la jaro 1639 la registaro elpelis portugalojn kaj la japaninojn, kiuj rilatiĝis kun ili. Tiuj virinoj estis ekzilitaj al Ĵakarto²⁾. El tiu "fora" transmara urbo ili hejmsopiris tagnokte kaj skribadis leterojn al siaj gepatroj kaj parencoj: pluraj el tiaj skribaĵoj atingis la adresitojn per oportunaj ŝipoj kaj almenaŭ nur kelkaj restas ĝis hodiaŭ kiel la kortuŝaj kaj larmoplenaj "Leteroj el Ĵakarto".

Sed kion mi skribis supre, tio ne signifas, ke la japanoj ĉiam estis enfermitaj enlande, kiel estas iliaj multoblighintaj posteuloj en la komenco de la lasta duono de la XX-a jarcento, — haringo-kunpuŝiĝe svarmantaj ĉie en la urbejoj kaj disse sur la strio da kvar insuloj. Efektive ĝis tiu tempo multaj el ili estis aventurintaj aŭ por komerco sub la registara protektismo, aŭ por elmigro, al Formoso, Luzono, Siamo, Makao, Anamo, Javo, Borneo, Malajo, ktp. Kaj tiun sudan "eksterlandon" entute, ili nomis *nanbano*, post la ĉina esprimo, (signifanta: suda barbaro (kiel tradukite ankaŭ en la Nova

Japana-Esperanta Vortaro de J. Okamoto, p. 443, meze de la maldekstra kolumno). Ksenofobio³⁾ estis komplekso komuna en ĉiuj rasoj tra la mondo! La kompatindaj portugaloj kaj hispanoj, kiuj laŭ tiuj sudmaraj havenoj venis al nia lando, estis do nomataj "nanban-jin" kaj iliaj galeasoj "nanban-sen" por signifi, respektive, eŭropanoj⁴⁾ kaj eŭropaj ŝipoj. Kaj por diferencigi de ili la postvenintajn holandanojn, anglojn kaj aliajn, la japanoj — nigrabaraj — nomis ĉi lastajn "kômô-jin", t.e. ruĝharuloj, post la ĉina esprimo⁵⁾. Estos interese noti, ke la japanaj viroj tiutempe portis la pitoreskan sed kuriozan *ĉonmagon* (hartuberon), kies prestiĝo ankoraŭ ĝis hodiaŭ estas tradicie flegata super la nuko de ĉiu profesia luktisto! La komerca rilato de tiaj japanoj kun la sudmaraj indiĝenoj kaj la ruĝharuloj post la nanban-fremduloj prosperis ĝis 1635, kiam la registaro ĝin malpermesis.

La kvietaj "ŝlositeco" de Japanujo — dum kiu, tamen, Nagasaki estis la sola pordeto por limigita komerco ekskluzive kun ĉinoj kaj holandanoj — daŭris iom pli

*) Malŝato al fremduloj.



Nanban-ŝipo

ol ducent jarojn, 1635–1853, kun la kresk-
antaj pord-frapoj, aŭ pliĝuste, perfortaj
agitaj kaj minacoj de ekstere en la fino
de la periodo. En 1854 Japanujo estis
devigata malfermi sian pordon por la
eksterlando. Depost 1858 la blankuloj —
usonanoj, holandoj, rusoj, angloj, francoj
k. a. — en granda nombro alvenis.

Jam de la komenco kelkaj el ili
postuladis ne sole la oficialajn rilatojn kaj
komercajn negocojn kun Japanujo, sed
ankaŭ kion ĉiuj lernejoj legolibroj de
historio pretersilentas: nome, afekciajn
rilatojn kun japaninoj kiel siaj “konkub-
inoj”, insistante kaj pravigante sin, ke ili
tiel ne rompus la japanan leĝon, supre
menciitan, pri la malpermeso de mik-
edziĝo. Necese, la ĉonmago-portaj oficistoj
de la registaro kaj lokaj magistratanoj
“konferencadis” super tiu gravega prob-
lema, kaj malvolonte decidis permesi, ke
ili konkubigu al si nur publikulinojn.
Sed ili ne estis kontentaj kaj eldevigis
neprofesiajn virinojn. Tiamaniere, la
nombro de la “konkubinoj” grandiĝis,
kreskadante de ĉ. 500 licencitaj virinoj
kaj nur kvin-ses neprofesiaj en la jaro
1862 ĝis ĉ. 2500 virinoj el ambaŭ specoj,



Alveno de nanban-fremduloj

plejparte tamen la ne-profesiaj, en la jaro
1866 — laŭ la statistiko siatempe de la
Kanagaŭa-magistrato, en la nuna Joko-
hamo, se ne citi la ciferojn — kiuj cetere
ne estas je mia dispono — el la kelkaj
aliaj havenurboj tiutempe malfermitaj
por eksterlanda komerco. Kredeble la
nombro ĉie ankoraŭ pli kreskis.

De tiu tempo la japanaj konkubinoj de
blankuloj estis nomataj “raŝamen”. virinoj.
Pri “raŝa” mi jam klarigis, ke ĝi estis
japaniĝinta el la portugala vorto RAXA,
speco de maldelikata teksaĵo el kotono;
sed “raŝa” ĉiam el lano. (Mi poste trovis
en enciklopedio, ke “raŝa” estas modifiĝo
de la holanda *Rassen*, speco de lanteks-
aĵo, enportita per holandaj ŝipoj). La
unuaranga varo, kiun Japanujo importis
tiutempe, konsistis el teksaĵoj, inkluzive
lan-kotonajn miksaĵojn, kiujn oni nomis
“raŝamen” (<men = kotono). Tiajn
ŝtofojn la blankulaj maristoj kaj ŝipanoj,
dum la vintraj noktoj, kiam ili ne povis
disponi la lukson kaj plezurojn de la
bordelo, uzadis kiel ian manekenan kun-
kuŝilon por komforte varmigi sin en
kajutoj. El tio, la vorto “raŝamen” baldaŭ
komencis figuri la kunkuŝulinon (konkub-
inon) de blankulo.

Tamen, la vorteton “men”
la vortaroj ĝenerale regi-
stras per la antaŭelemento
de “men”jō: ŝafo (<(men
= delikata fibro) + (jō =
ŝafo)). Mi notas por niaj
legantoj, ke tiu vorto,
malgraŭ la epiteto, ne nepre
signifas la merinon, sed estas
la komuna nomo de ŝafo
(“hicuĵi”), uzata distinge
de la kapro “jagi”, kiun
ni skribas ideografie: aŭ
“kampo-ŝafo” aŭ “monto-
ŝafo”. Ankaŭ ĉi tiu, malgraŭ
la ideografiaĵoj ne signifas

la tragelafon, nek la kornegoportan
sovaĝan specon el la Roka Montaro (Kp.
angla: *mountain sheep*). Oni do vidas,
ke “raŝamen” denove estas hibrid-kunmet-
aĵo: <RAXA-ŝafo (aŭ *Rassen-ŝafo*?).
Kaj ĉiuj fidindaj vortaroj aldonas la duan
sencon: konkubino de blankulo. Sed pri
la kialo aŭ kialigo de tiu ĉi figura uzo,
nu — varias la opinioj. Unu alia, krom
la jam citita supre, respondas: ... tial, ke
ŝi estas surrogato por uzo de bestadulto,
kaj ankoraŭ alia: ... ĉar ŝi metaforas la
ŝafon, kiu mikskuniĝas eĉ kun fremda
speco. Kiu el tiaj difinoj estas korekta,
mi ne scias. Sed la laste citita interpreto,
eĉ se ĝi estus veninta nur el folkloro
etimologio aŭ senrjua***) sarkasmo, ŝajnas
al mi plej bone espriminta la mensan
reagon de la malmmodernaj japanoj je
kio ŝajnis al ili — se eblas tiel diri —
hemion-naska kuniĝo. Kiel ajn estu la
etimologia ekspliko, la vorto “raŝamen”
en la dua signifo ankoraŭ vivas revokeble
en la memoro de ĉiuj japanoj grandaĝaj
kaj eĉ mezaĝaj. Krome, ĝi ĝuas ripozon
en la Plena Japano-Esperanta Vortaro de
T. Chif (6-a eld., 1931), kiel, “rasyamen”:
konkubino (japana) de alilandano; kaj
ankaŭ en la supre citita Vortaro de J.
Okamoto, kiel, “raŝamen”: konkubino de
alilandano (p. 487). Certe de “alilandano”,
sed pli precize, de blankulo, kiel mi jam
klarigis.

La genealogia registro de la raŝamenoj
kaj de la pli modernaj tipoj de tiaspecaj
virinoj, profesiaj aŭ ne-profesiaj, povas
esti daŭrigita ĝis hodiaŭ, kompreneble,
kun la escepto de interrompo dum la
militaj jaroj. Ĝin pritrakti tamen, tio estas
alies tasko...

Antaŭ ol fini mian nunan artikolon,
mi volas aldoni ankoraŭ unu apartan
aferon, kiu ankaŭ interesus niajn legantojn,
el antropologia vidpunkto. Por tio ni
bezonas — pardonu, gesinjoroj, ke ni



Sidanta belulino

bezonas — “malkovri nian postaĵon” al
ĉiuj! Jam de la geneza praepoko (?) kaj
pro kia mi ne scias Di-kaprico, ni japanoj
kaj aliaj orientanoj, en la tempo kiam ni
estas naskitaj, portas “stigmaton” en la
formo de helblua haŭtmakulo ĉe la postaĵo
— ĉefe ĉirkaŭ la kokcigo — kiu tamen
malaperas laŭ la forpaso de kelkaj jaroj.
La germana kuracisto, d-ro Erwin Baelz
(1849–1913) “eltrovis” ĝin ĉe japanaj
infanoj kaj li — kiel Ferdinand Magellan
la Pacifikan Oceanon — nomis ĝin “Mongol-
makulo” (*Mongolenflecke*) — mongolo en
la senco: orientano. Oni diras, ke tia
bluaĵo ne absolute sed preskaŭ tute
mankas ĉe la blankuloj!

Prof. Susumu Oono, en sia “Nippongo
no Kigen” (Origino de la Japano Lingvo,

**) *Senrjuo*: sprita-satira poemeto en
la versformo sama al hajko

eld. 1957) pritraktas i.a. la tezon de la "mongol-makulo" en ĉapitro, kie li mencias la malsamecojn de la rasoj japanaj kaj ainaj (la indiĝenoj en Hokkaido, la plej norda insulo de Japanujo) — rilate la devenon de la japana lingvo. El lia libro mi citos du statistikajn tabelojn, kies fontoverkoj estas indikitaj en ĝi kaj kiuj estas interesaj precipe por la nuna temo. Mi uzos la mallongigojn: M. M. = Mongol-makulo; Kol. = Koloruloj; Blan. = Blankuloj.

Portantoj de M. M. (en %)

(Milano)	1.1
(Parizo)	1.0
Germanujo	0.17
(Berlino)	2.0
Japanujo	99.5
Koreo	90~100
Ĉinujo	97~98
Filipinoj	100
Anamo	80
Siamo	89
Sumatro	100
Borneo	100
Malajo	100
Havajo	100
Ĉilio	48.0
Brazilo (Negroj)	65.0
(Blan.)	1.5

Hered-sciencia observo pri M. M., farita en Havajo super la "miksvariaj" infanoj de polinezianoj, indianoj, japanoj, ĉinoj,



Hakata-pupo

koreanoj, hispanoj, portugaloj k. a. montras la japanan rezulton:

Kombino de gepatroj	Nombro de infanoj	Portantoj de M. M.
Kol. × Kol.	217	213
Blan. × Blan.	67	0
Kol. × Blan.	68	34

El la supra tabelo ni vidas, ke la M. M.-portantoj el la kombino de "koloraj" gepatroj estas 98 %, de la "blankaj" gepatroj 0% kaj el la miksvaria interkruciĝo — 50%.

(T. Mikami)

NOTOJ (Cifer-referencitaj)

¹⁾ Bv. forigi mian propran "stultaĵon" sur p. 184 de O., 1958 (maldekstre, 12-a linio), kie mi skribis, ke terpomoj unufoje venis al nia lando el Havajo: Havajo devas esti korektita je Javo. Tiutempe japanoj prenis Ĵakarton por Javo. Jen kial ili nomis terpomon el Javo: "Ĵagatara-imo". Pri Ĵakarto, vd. 2) sube.

²⁾ La ĉefurbo de Indonezio; antaŭe nomita Batavio.

³⁾ Ekz.: "Nan ban jin va cōre vo cuvanu, *Europei hoc non manducant.*" (Nanban-jin ŝia kore ŝia kuŝanu = Eŭropanoj ĉi tion ne manĝas.) sur p. 39 de Didako Kollado: ARS GRAMMATICAE IAPONICAE LINGVAE, 1632.

⁴⁾ Ĉinujo sin nomas [Ĉunghŭa Minkŭo. Ĉunghŭa, laŭlitere "mez-floro", signifas: Centra Kultur[lando]. (Minkŭo = Popollando). En la antikva tempo la ĉinoj nomis la "eksterlandon" per kvar malsamaj ideografiaj signifantaj: Okcidentaj barbaroj, Orientaj barbaroj, Nordaj barbaroj, Sudaj barbaroj. En la *Kroniko Ming-dinastia*, elfarita en 1740 p. K., troviĝas frazo: "Holando aŭ ruĝharbarbar(uloj)" (laŭlitere).

⁵⁾ Oni do facile vidas, ke en nia lando la idoj de idoj ankaŭ de tiuj blankaj galantuloj, ankoraŭ ie vivas kun vizaĝaspekto miksnuancita, kia estus tiuj forfandiĝinta ĉe la idoj el la kombino de japanoj kun ĉinoj aŭ koreanoj. En la lasta tempo — postmilita — la generado de tiaj miksdevenaj idoj ripetiĝis en la japanaj urboj, kie instaligis usonaj kaj aliancaj armeoj. La plej unuaj naskitoj jam estus atingintaj la aĝon por mezlernejo, sed el ĉiuj mikstrasaj infanoj, — kvankam laŭ-nombre ili estas kelkaj gutoj en rivero — tiuj de la patrinaj, kies viroj forpafis sin, estas unu el la sociaj problemoj en Japanujo, eble, same kiel en aliaj landoj prostituataj de fremdarmejaj okupantoj.

KLARIGO PRI LA BILDOJ

Nanban-ŝipo (sur p. 85) kaj *Alveno de nanban-fremduloj* (p. 86) prezentas partojn de unu el la t. n. "nanban-biomboj". kiujn japanaj pentristoj, plejparte anonimaj, ellaboris en sufiĉe granda nombro dum la pli-malpli kvardek-jara periodo antaŭ la jaro 1638. (Mi permesas al mi la enkondukon de la vorto *biombo* en esperanton por signifi: japana fald-ekranego.) Niaj kliŝoj tro dense n'grunis la riĉegajn kolorojn de la pentraĵo, kaj estas tro malgrandaj por redoni la precizajn detalojn pri la etoso, moroj kaj kutimoj. Sed en la *Alveno de nanban-fremduloj* oni almenaŭ povas vidi maldekstre sur la strato grupon da ĵus alvenintaj fremduloj kun tri hundoj, benvenigatan de japanaj magistratano kaj kelkaj ekleziaj patroj, dekstre. Ilin rigardas la virinoj kaj ties lakeoj tra la fenestroj de la domo, kiu estas bordelo; kaj en la supra etaĝo, super la frisa nubo, estas videblaj kelkaj nanban-klientoj sidantaj en la ĉambro. Preskaŭ ĉiu el la nanban-biomboj, kiuj restas ĝis hodiaŭ, konsistas el paro da ses-panelaj ekranegoj, pritraktantaj la similajn temojn tre realisme; ili havas altan valoron ne sole artan, sed ankaŭ historian kaj ĉefe etologian.

Sidanta belulino (sur p. 87) estas pentrita de anonimulo laŭ la kaĝecudo-stilo de la ukijoe-ĝenra pentroarto. La pentraĵo de la kaĝecudo-skolo (tiel-nomita post la persona nomo de la fondinto Ando Kaĝecudo, 1671-1743) ĉiam prezentas po unu aŭ tri demimondaninojn starantajn aŭ sidantajn. Siatempe la hetajroj de la fama demimondo Joŝiŭara en Edo (la malnova nomo de Tokio) estis tiel popularaj en certa rondo, ke iliaj bildoj, kiaj, ekz-e, la *Sidanta belulino*, estis publike vendataj — same kiel la ukijoe-bildoj de la renomaj aktoroj (sed neniu aktorino!, ĉar tiutempe la virinan rolon ludis la viroj). La komunaj trajtoj de la virino pentrita de la kaĝecudo-skolanoj estas la diketaj konturoj fortoplenaj kaj la bunta kolorado de la kimono, kaj — la senesprima unutona vizaĝo. Bonŝance, mi rimarkigas, ke la kimono de tiu ĉi *Sidanta belulino* estas ĝuste tiu speco de la "genroku-kosode", kiun mi mencias en mia artikolo "Miskompreno — Mistraduko", sur p. 118 de Oomoto, 1958. Vidu la larĝan, kaj imagu la buntan, desegnaĵon de acerfolioj sur (*Al paĝo 92*)

Pri "Naturista Medicino"

Estimata Sinjoro,

Legante la artikolon de J. Scolnik, "Kiel kuracas la naturista medicino", mi vere miris. Kutime mi pripensas Japanujon kiel progresema lando, evoluiginta ĝis la plej altaj niveloj de la civilizita mondo. Kiel, do, ĝuste tie eblas publikigi artikolon pri "naturista medicino", kiu efektive alproksimiĝas pli-malpli al la pramedicina arto de Eŭropo antaŭ la dekoka jarcento p.K.? Tiam oni ankoraŭ kredis je bonaj kaj malbonaj spiritoj kaj "humoroj", nenion sciante pri bakterioj, virusoj, vitaminoj, anestezoj, antibiotikoj aŭ eĉ spiroinoj. Kiom pli ni scias nuntempe!

Mi skribas ĉi tiun leteron ĉar mi timas ke la artikolo de "D-ro" Scolnik, kaj samspecaj klopodoj, povus havi malbonegajn sekvojn. Se leganto havas nur simplan malvarmumon, ne multe gravas ĉu li glutas aspirinon (kiu certe efikus per malfortigo de kapdoloro, ktp.), aŭ iun "naturistan medicinon" (kiu eble helpus almenaŭ psike), aŭ tute nenion: post kvin tagoj espereble li resaniĝos. Sed kontraŭe, se oni suferas pro pneŭmonio aŭ sifiliso, lepro aŭ apendicito, ne agnoskante modernajn medicinajn rimedojn oni sen-necese multe suferos kaj trofrue mortos. Pro tio, mi rigardas la "naturistan medicinon" ne nur kiel senutila malsaĝeco, sed efektive kiel vera danĝero. Oni prefere fidu la modernan medicinon — ne pro ties perfekteco, kompreneble, sed ĉar ĝi strebas enkorpiĝi sciencajn progresojn kiel eble plej frue. Do — al saĝeco per saĝeco!

Nun permesu ke mi aldonu alian kritikajon, pli ĝeneralan. Ĉu ne devus esti iom da redakta respondeco pri ĉiuj verkoj

en organo iuspeca? Kutime, en sciencaj rondoj, la redaktoro transmetas ĉiun artikolon, antaŭ ĝia akcepto, al almenaŭ unu kompetenta faka spertulo. Ne temas pri persona maltoleremo aŭ antaŭjuĝo, nur pri la fidindeco kaj korekteco de la verko. Eĉ inter Esperantistoj mi proponas ke tiu sistemo bone taŭgus. (Mi estas certa ke la fama Japana profesoro S. Nishi volonte helpus je medicinaj aferoj.)

Sincere via,

(D-ro) Ralf A. Lewin

Marine Biological Laboratory Woods
Hole, Massachusetts, Usono.

*

Tre estimata samideano:

Mi ricevis kopion de la letero adresita al vi de D-ro Ralph A. Lewin, kiun vi sendis al mi. Dankon!

D-ro Lewin miras ĉar en progresema lando kiel Japanujo estis publikigita mia artikolo pri naturista medicino, kiu, laŭ lia opinio, alproksimiĝas al la pramedicina arto de Eŭropo mezepoka.

Li eble ne scias ke ĝuste en la plej progresemaj landoj de la mondo la naturista medicino estas pli disvolvita. Ne nur oni publikigas tie artikolojn pri, sed ankaŭ revuojn, librojn, broŝurojn, ktp. En tiuj landoj abundas la naturkuracistoj, la naturistaj kuracejoj, hospitaloj, asocioj, eldonejoj, kolonioj, lernejoj kaj fakultatoj.

Li konfuzas naturistan medicinon je superstiĉo ĉar li tute ignoras la grandegan sciencan laboron de eminentaj naturkuracistoj, kiel Bircher-Benner (Zurich, Svisujo), Schönerberger kaj Emil Klein (eks-profesoroj de la universitatoj de Berlin kaj Jena, Germanujo), Prof. D-ro

Alfred Brauchle (direktoro de Parksanatorium, de Schönau, Germanujo, kaj aŭtoro de multaj valoraj verkoj pri naturmedicino: "Ergebnisse aus der Gemeinschaftsarbeit von Naturheilkunde und Schulmedizin", kie li konigas la rezultaton de sia longjara sperto en la Krankenhaus, de Dresden, Germanujo, "Das grosse Buch der Naturheilkunde" ĵus publikigita, kaj aliaj), ktp, ktp.

Eĉ en Usono estas grandaj naturistaj asocioj, eldonejoj, kuracejoj, ktp. kaj kelkmiloj da naturkuacistoj laŭleĝe rajtigataj, kaj la naturista medicino estas oficiale instruata en pluraj ŝtatoj de la lando. Laŭŝajne, D-ro Lewin nenion scias pri tio kaj li havas antaŭjuĝon kontraŭ la naturista medicino eble influata de ĉarlatanoj de sia propra lando aŭ de alies opinio. Tamen tiu sinteno, kiu povas esti sincera, ne estas inda de scienculo, kiu nepre devas pristudi aferon antaŭ ol konigi opinion.

Mi jam klarigis en mia artikolo ke la naturaj elementoj de kuracado estas dieto-, helio-, aero-, hidro-, geo-, ŝlim-, elektro-, kinesio-, fito-, psiko-terapioj, ktp, ktp. Ili ĉiuj estas ordinaraj lernobjektoj de la medicinaj fakultatoj, eĉ alopatiaj, de la tuta mondo. Sed la plimulto de la alopatiaj kuracistoj konsideras ilin negravaj kaj aplikas ilin malmulte kaj neracie. Ili konsistigas, kontraŭe, la doktrinaron de la naturista medicino. Tiu ĉi sistemo jam estis pli ol sufiĉe pruvita en siaj efikeco kaj scienca fundamento kaj tute ne sufiĉas nespond-eca eldiro por ilin nuligi.

D-ro Lewin, kiu moke skribas "D-ro" Scolnik ("D-ro" inter citigoj), devas scii ke mi estas "kuracisto-kirurgisto" de la Nacia Universitato, de Córdoba (Argentino), kaj mia diplomo estas datita la 12an aŭgusto 1933. Sed mi neniam aplikis la alopatian sistemon, ĉar mi ne kredis je ĝia efikeco. Nur la naturistan sistemon

mi aplikis ekde la unua momento, same kiel miloj da aliaj naturkuracistoj en la tuta mondo.

D-ro Lewin timas ke mia artikolo povus havi malbonegajn sekvojn se la malsanuloj sekvos miajn konsilojn kaj ne akceptos la "modernajn" rimedojn. Ne, ili pro tio tute ne suferos nek trofrue mortos. Tute kontraŭe: se ili ne englutos liajn "sciencajn" drogojn, ili rapide resaniĝos kaj vivos longajn jarojn plue por ridindigi liajn antibiotikojn, aspirinojn kaj aliajn venenojn.

Eĉ pulminflamo, sifiliso, lepro aŭ apendicito estas perfekte kuraceblaj per la naturista medicino, laŭ mia 25-jara sperto kaj la sperto de miloj da aliaj naturkuracistoj tra la tuta mondo. (Rilate la sifilison oni legu: "La vero pri la sifiliso" de la germana kuracisto D-ro Med. Meier).

D-ro Lewin rigardas la naturistan medicinon kiel veran danĝeron. Prave, ĝi estas vera danĝero, sed tute ne por la malsanuloj. Ĝi estas danĝero por la ekspluatantoj de la malsano, de la mal-klereco, de la malvirto kaj por la fabrikantoj de drogoj kaj medikamentoj, kiuj enspezas ĉiujare milojn da milionoj da dolaroj kostpage de la malfeliĉegaj malsanuloj, kiuj naive kredas je ilia efikeco kaj pro tio iras antaŭtempe pleniĝi la tombejojn.

D-ro Lewin proponas finfine, ke antaŭ la publikigo de artikolo pri medicino oni ĝin transmetu al alopatia spertulo por ĝia aprobo. Evidente, li tute ne komprenis, ke per mia artikolo mi sidigis la alopatian medicinon sur la benko de la akuzatoj. Ĉu oni povas akcepti ke reprezentanto de la alopatio estu samtempe juĝisto en tiu sama afero?

Sendube D-ro Lewin volas ĉiel silentigi la voĉon de la naturista medicino, kiun li tre timas kvankam li ĝin tute ignoras. Kaj tiucele li revas pri iuspeca Medicina

Inkvizicio, kie la "herezuloj" kiel mi estu juĝataj kaj brulataj je la nomo de la "sankta" medicina scienco (alopatio). Li volas importi en sciencon kampon la saman procedon, kiun Hitler uzis antaŭ nelonge en la politika kampo. Tiu sinteno ne estas inda je sciencisto, kiu sincere serĉas la veron, kaj malpli inda ankoraŭ je civitano de lando, kiu sin proklamas ĉampiono de la libereco.

Mia artikolo, kiu tiel malplaĉis al D-ro Lewin, vekis la intereson de la legantoj de "OOMOTO" tra la tuta mondo. Tuj post ĝia apero mi ricevis leteron de Germanujo kun peto de tradukpermeso en la germanan lingvon por "Zeitschrift für Naturheilkunde" (Revuo por natur-medicino), kie ĝi nun estas publikigata. Tradukoj de tiu artikolo mia jam estis publikigitaj kaj hispanan lingvojn jam estis publikigitaj en Japanujo kaj Argentino, respektive. Tradukoj en aliajn naciajn lingvojn espereble baldaŭ sekvos.

Mi salutas vin samideane.

(D-ro) Jaime Scolnik
Córdoba, Argentino

Redakcia Noto

Pri la enhavo de ĉiu artikolo, kiu aperas en OOMOTO, respondecas la aŭtoro aŭ subskribinto de tiu artikolo. Sed se ni publikigas iun aŭ alian artikolon, tio signifas, ke ni principe akceptis kion li aŭ

(De paĝo 89) la tuta kimono kaj aparte la "maniketon" kun la pendaĵo fasonita laŭ la U-formo, kiel mi jam klarigis en tiu artikolo. (La naŭban-biombo, el kiu la du bildoj estas pruntitaj, kaj la *Sidanta belulino* estas en konservo ĉe la Hakone-Artogalerio; reproduktitaj ĉi tie el "Kokusai Syasin-zyōhō" — International Graphic.)

Hakata-pupo (sur p. 88) prezentas virinon en la ĉiutaga kimono klesik-stila. Kun la hararangō, la kolumo borderita per dika garbaĵo el nigra atlaso, kune kun la subvesto kolumo, dekoltita ĉe la sino kaj cignokole, ĝis malsuper la nuko, kaj la sid-poze kun unu genuo levita, ŝi emanis maturulinan pimpon. Kelkaj virinoj en tia kostumo ankoraŭ hodiaŭ estas troveblaj en la geĵŝa kvartalo. (Reproduktita el la esp-a feldfolio "Vin invites HAKATA", disdonita okaze de la 45-a kongreso japana, ĉe Hakata, Kjuŝu, 1958.)

ŝi pritraktas en ĝi.

D-ro Scolnik siatempe havigis al nian biografieton, laŭ nia peto, sed ni rezervis ĝin por uzo de japana esperantisto, kiu deziris poste eldoni la artikolon de d-ro Scolnik en libroformo. En tiu biografieto d-ro Scolnik skribas, i.a.:

"Poste mi transloĝiĝis al Córdoba, kie mi studis en la medicina fakultato kaj samtempe laboris kiel helpanto de la katedro pri anatomio (mi gajnis tiun postenon en konkurso). En 1931, en alia konkurso, mi gajnis postenon de profesoro pri franca lingvo en la Nacia Kolegio Monserrat, dependanta de la Nacia Universitato de Córdoba. En 1933, mi ricevis mian diplomon de kuracisto-kirurgo.

"Sed mi nianiam aplikis la alopatian sistemon, ĉar mi ne kredis je ĝia efikeco. Nur la naturistan sistemon mi aplikis ekde la unua momento".

Do, oni vidas, ke d-ro Scolnik pritraktis la temon ne pri "fremda kampo", sed pri la propra kampo, kiun li kaj samskolanoj prikulturis. Niaflanke, jam sen legi lian biografieton, ni persone konas lin kaj sciis liajn karieron kaj kompetentecon pri "Naturista Medicino".

Al d-ro Lewin ni respondas, ke ni sekvas lian afablan konsilon nur kiam ni iam bezonos publikigi artikolon, ekzemple, pri "Moderna Medicino", verkitan de iu ne-kompetentulo en tiu scienca fakokoran dankon!

Recenzo

★ TEATRO de Machado de Assis. Kvar komedioj tradukitaj el la portugala en Esperanton. Eldono de Liga Brasileira de Esperanto, Praça da República, 54-1, Rio de Janeiro, Brazilo. 155 paĝoj (ĉ. 12.5 × 18.5 cm). Prezo: egalvaloro de 80 kr. por broŝurita ekz.

Ĉiuj estas unuaktaj komedioj kaj tri el ili temas pri amo. *La protokolo* (trad. de M. Aveleza de Sousa) pritraktas malpacigon de junaj geedzoj kun interveno de bonkora kuzino, kiu klopodas repacigi ilin, kaj de ilia maliceta amiko, kiu profitas la okazon amindumi al la sinjorino sed fiaskas; finiĝas per repaciĝo de la feliĉaj geedzoj. *Ne konsultu kuraciston* (trad. de A. Caetano Coutinho) temas pri la fieraj konsiloj de maljuna sinjorino por "kuraci" ŝian propran filinon suferantan de perdita amo, unuflanke, kaj frenezule suferantan junulon, kiu estas perfidita de sia amatino, aliflanke; inter tiuj du gejunuloj naskiĝas rekta interkompreno kaj ili interligiĝas tiel, ke ili estas "kuracitaj" sed laŭ maniero tute alia, kaj pli simpla, ol kiel la maljunulino preskribis. *Preskaŭ ministro* (trad. de Henerik Kocher): La viron, kiu en la tago de la okazinta disfalo de la kabineto estas kalkulata je eventuala "ministro", vizitas multegaj personoj unu post la alia por intervjuo kaj ŝutas per flatemaj vortoj por iel profiti el lia nova posteno, sed tiuj „okazprofitantoj" malaperas ĉiuj kiam lia "ministriĝo" efektive ne okazis. *Leciono pri botaniko* (trad. de Débora

do Amaral Malheiro): Botanikisto, kiu pro amo al la scienco, malaprobas la amon de sia nevo al najbara knabino, vizitas la domon de la najbara sinjorino por peti bari la vojon al la geamantoj, sed dum la negocado li mem korinkliniĝas al juna gracia vidvino en ŝia domo, kaj fine permesas la edziĝon ne nur de sia nevo, sed ankaŭ de si.

La lingvaĵo tra ĉiuj komedioj estas glata (escepte kelkajn nekutimaĵojn) kaj la enhavo estas interesa. Sed la dialogoj tie kaj ĉi tie estas por mi aŭ malfacilaj aŭ nekompreneblaj. Ĉu tion parte kaŭzis al mi "la tropika esprimmaniero uzata en la tiama Rio de Janeiro". kaj parte ankaŭ la traduko?

"Teatro" estas eldonita memore de la 50-a jaro de la morto de l' aŭtoro kaj kiel la unua el la serio, kiun oni intencas eldoni okaze de la Ora Jubileo de Brazila Esperanto-Ligo. Ni do atendu plian kontribuojon el la brazila belliteraturo!

Teruo Mikami

★ VOJAĜO AL KAZOHINIO, romano originale verkita de Esp. de Sándor Szathmári: eldonita de SAT, 67 avenue Gambetta, Paris-20, Francujo 1958. 315 p. (12 × 21 cm). Prezo: 2.40 dol.

"Vojaĝo al Kazohinio" estas satira legaĵo verkita laŭ motivoj de "Vojaĝo de Gulivero" de Swift. Dum la verko de Swift nuntempe estas ŝatata de infanoj, tiu de Szathmári destinita nur por plenkreskuloj. Ĉi tiu konsistas el du partoj: Gulivero inter la *Hinoj* kaj Gulivero inter la *Behinoj*. Ili tamen ne estas liliputuloj nek gigantoj kiel de Swift.

Temas pri la utopio — materie perfekta socio. Ties popolo nomata la *hino* konas la puran esencon de la homa estado — *kazoon*. ("Kazoo estas la klara prudento, kiu vidas antaŭ si, laŭ matematika rektlinio, kiam kaj kiel ĝi devas ion fari, por

ke la individuo akiru la plej altan postaton per la socio. La kazoo havas neniam sentimentan karakteron.”) La lando estas ekipita tute per elektromaŝinoj: la pordo aŭtomate funkcianta pere de nevidebla radio, la telefono kiu fiksas la sciigon sur rubandon, la kino en kiu estiĝas laodoro ktp. Cetere ilia tipvestaĵo estas farita per kunĝluado. (Rimarkinde ke la aŭtoro antaŭvidis ilian realiĝon jam en 1935.) La socion ne regas kapitalismo: ĉiuj vivnecesaĵoj estas akireblaj kiam ajn libere laŭ la volo de la loĝantoj, kiuj kondutas nur laŭ la komuna animo. La hinoj ne havas la koncepton pri individua animo; ili do malhavas la kunhomajn sentojn: amon, amikecon k.a. Nek muzikon, nek beletristikon ktp. Jen, imagu, kiel komike Gulivero kondutas inter ili tute fremdaj al si!

Post la ripetado de siaj fiaskoj (ekz. estiĝi animon en hina virino, kun kiu li eĉ kunlitiĝis) Gulivero petas, ke oni enkonduku lin inter la *behinojn*, kiujn la hinoj rigardas nehomaj naturkreaĵoj kaj kiujn ili enfermas en aparta loko — frenezulejo. Enkondukite tien, Gulivero kun mirego konstatas ke ilia frenezeco estas eĉ mortige terura, ĉar unuopa fakto havas ofte multajn kontrastojn, el kiuj ne estas eble distingi, kiu ja estas vera. La sana cerbo scias nur tion, ke la blankan koloron ĝi ne rajtas aserti blanka, sed neniam scias, per kiu koloronomo indiki. Tamen ekzistas okazo kiam la behina opinio estas elkalkulebla, nome, je faktoj, kiuj havas nur unu solan kontraston. Ili ĉiam ridas pri la tute seriozaj, senchavaj, saĝaj aferoj por la sana cerbo, kaj la aferoj, kiujn ili rigardas seriozaj, estus ridindaj por la homoj. Cetere ilia karaktero ankoraŭ restas en sovaĝa krueleco. La al ili malkonvenaj kondutoj de Gulivero nur kaŭzas pli da frenezeco al ili kaj venigas al li danĝeron. En la fatala momento, la hinoj

suraŭte enkuras por lin savi. Kaj poste li sukcesas fuĝi el la Kazohinio.

La bonhumoro kaj satiro en la unua parto puŝis min al impeta legado. Ĉi tie la aŭtoro reliefigas mankojn de la homa civilizo precipe en kontrasto de la homa racio kun la homa sentimento.

Sed enirinte en la duan parton mia granda atendo subite estis perfidata. Troe konfuzaj vivmanieroj de la behinoj peze premis mian koron, eĉ donante al mi impreson, kvazaŭ mi mem freneziĝus. Jam tediis al mi legadi pro ilia stulteco. Tamen en la fundo de mia koro ofte flagris intereso por solvi la intencojn de la aŭtoro kaŝe penetrintajn en la verkaĵo. Ne malplezure estas trovi simpatiajn figurojn el tiuj deformitaj karakteroj de la behinoj. La aŭtoro ĉi tie rigardas homajn interrilatojn laŭ la vidpunkto tute renversita al tiu de la unua parto. Inter ili troviĝas neniu ombro da racio, sed nur akcento deformitaj sentimentoj. En ĉi tiuj mi foj-foje vidas karikaturnajn figurojn de la despotismo en nia reala mondo. Tra la tuto de la verko la tipoj de hinoj kaj behinoj tamen troviĝas intime inter ni homoj. La aŭtoro sagace elfosas la radikojn de sociaj malbonoj enplantitaj funde en ĉiuj popoloj.

Sed verdire por mi estas malfacile precize diveni, kian intencon havas la aŭtoro mem pri ĉi tia insida libro. Kiel la saĝa antaŭparolo de K. Kalocsay, mi lasas tion al legantoj, danante al ili demandon, ĉu la aŭtoro estas filozofia idealisto, aŭ materialisto, aŭ ekzistencialisto, aŭ socialisto.

La lingvaĵo estas bonega. Estas skribite, ke K. Kalocsay reviziis la tekston laŭ lingva vidpunkto. La sola makulo estas pli malpli multaj preseraroj. Krom la korektoj presitaj sur aparta folio, mi trovis ankoraŭ pli ol dek. Krome troviĝas multaj samspecaj gramatikaj eraroj. Kiam la

subjekto estas infinitivo aŭ propozicio, la adjektiva predikativo alprenas la adverbaneŭtran finaĵon; ekzemple: *Por pruvo estas sufiĉa* (estu: sufiĉe) *menĉii...* (p. 15); *Al mi ŝajnas absurda* (absurde) *ke...* (p. 66). Tiaj eraroj troviĝas sur la paĝoj 61, 171, 186, 205, 214, 225, 240, 258, 259, ktp. Nekorektaj estas la esprimoj: *...kaj ke ĝis nun la kaŭzo de ĉiu malsatmizero estis pruveble la senpripensa konsumado de la kazea bulo* (p. 244) kaj *afero estis — laŭ behina vidpunkto, — tute logika kaj klara, konsiderante (?) ke la tuta afero estis...* (p. 245).

Mia gramatika kritiketo ne malhelpas min aserti, ke mi alte taksas la romanon de Szathmári kaj gratuli ĝian eldoninton SAT. Mi kore rekomendas la maloftan verkon al ĉiuj esp-istoj. *N. Eszmi*



KIU ESTAS KIU?

La eldonisto J. Régulo Pérez, konata per la serioj popularigitaj sub la nomo STAFETO, prenis sur sin la taskon eldoni libron kun la supra titolo (laŭ la multe uzata *Who is Who?*: ekonomia-politika-diplomata eldonaĵo). La *Kiu estas Kiu?* esperantista celas doni koncizajn sed fidindajn informojn pri pasintaj pioniroj kaj nuntempaj aktivuloj, kiuj iel koninde kontribuis al nia Movado. La skemo estas proksimume jene:

*Nomo(j) — antaŭnomo(j), eventuale

pseŭdonimo(j).

*Dato (tago, monato, jaro) kaj loko de naskiĝo, ev. de morto.

*Studo(j), ev. ankaŭ ŝatokupo(j).

*Civila kariero, laboro, kutimaj okupigoj.

*Agado por Esperanto, kun precizaj indikoj pri lokoj, jaroj ktp.

*Verkaro, kun indiko de kompleta titolo de la pecoj, loko kaj jaro de eldono, ev. numero de eldonoj de ĉiu peco kun pli ol unu.

*Notindaj apartaĵoj aŭ aldonaĵoj.

Ĉio en konciza, telegrafa, leksikona maniero, sed sufiĉe klara, por eviti denovan enketon pro dubaj punktoj. La tekston, ĉe plej konataj gravuloj, akompanu bona pasportformata bildo por ornamati la biografieton.

Redaktas la libron la estinta Direktoro de UEA S-ro Hans Jakob, Palais Wilson, GENÈVE, Svislando. La Estraro de UEA rajtigis lin uzi la riĉan materialon de la UEA-Biblioteko en Ĝenevo; plie la redaktoro disponas ampleksan dokumentaron el la redakcio de la *Enciklopedio de Esperanto*.

Temas pri kolektiva verko kaj la bonvolan kunhelpon oni sendu al la redaktoro. Ideojn kaj konsilojn plezure ricevos la redaktoro. Antaŭvideble la libro devas esti finredaktita kaj prestaŭge tajpita frue en 1960 (sub la kutima rezervo, bone komprenita).

Aperos antaŭ la aŭtuno

“Daŭrigo: La Respekto de l' Vivo”

de

Sanehide Komaki, Ph. D., Sc. D.

en Esperanta trad. de *Tazuo Nakamura*

Prezo estos nepli alta ol unu usona dolaro;

la pagmaniero anoncota

Antaŭmendon per p.k. al la agentejo:

La Redakcio de Oomoto



ZAMENHOF-JARO

En la tempo, kiam oni ofte faras surprizan parolon per cito de "astronomiaj" ciferoj, oni emas bagateligi nombroeton aŭ sumeton. Sed eĉ gutoj konstante frapante...

Ĝis nun kvin japanaj samideanoj respondis al nia anonco por UEA (aperinta en tiu ĉi rubriko de la antaŭa n-ro); kvar el ili jam pagis la kotizon, kiun ni peris al UEA, kaj unu alia skribis al ni jenon: "Legante la lastan paĝon de la lasta n-ro de Oomoto, mi estis forte puŝita. Ja mi plene konsentas, ke ĉiu esp-isto aliĝu al UEA. Mem mi estis delegito de la jaro — ĝis —. Tamen mi nun restas, kompreneble kontraŭvole, ekster UEA, kaj la kaŭzo estas simple financa. Mi tute ne pensas, ke la kotizo estas tro alta; kontraŭe mi eĉ volas esti delegito kiel antaŭe, kaj labori pli multe por Esperanto. Sed mi ne povas nun facile membriĝi al ĝi pro mia financa mizereco. Mi tion tre bedaŭras".

*

Por priparoli nian propran aferon — niaj redakcianoj estis tro maldiligentaj por peti aŭ instigi paĝon de tiuj, kies abono por "Oomoto" estas elĉerpita, kaj tro ĝentila por interrompi la sendadon de sufiĉe multaj specimena-ekzempleroj. Sed okaze de la Zamenhof-jaro ni decidis likvidi tian malpraktikan sistemon. Jam de antaŭ kelkaj monatoj ni kontaktiĝas kun ili unuj post aliaj per nia cirkulero kaj iliaj respondoj estas tre kuraĝigaj al ni. Tial ke la abona-prezo mem estas malgranda, la tuta sumo de la ĝisnunaj

enspezoj neniel povas esti "astronomia", sed la tuta nombro de la favoraj eĥoj ja eĉ mirigas nian kasistan fakon! Ni ĝojas kaj gratulas nin, ke al multaj nia gazeto plaĉas kaj meritis la paĝon por legado.

*

Jen kiel sprite unu nia afabla leganto s-ro K.K., kiu sin alnomas *Homo*, reagis je nia cirkulero:

ABONO

Fraŭlino Abono havas bonon, sed ne monon.

Sinjoro Demono havas monon, sed ne bonon.

Do, se la du geedziĝus,

kaj se ŝi akirus de li monon, kaj li de ŝi bonon,

tiam por ni estus ege bone,

ĉar necese jam ne estus pagi por Abono, nek jam ĉagrenus per malbono

nin Demono.

Verkis *Homo*.

(S-ro Redaktoro,

Bonvolu doni al Abono la enmetitajn 300 jenojn. K. K.)

*

DANKO

Kiel *Hom'* lecionas:

ĉar nur en Abon-mono

ja nuptas bon' kaj mono,

ni svatante demonas!

Rekanto

Al ĉiu homo,

kiu tion komprenas

por tuja abono,

ni agos ne demone,

sed restos nur madone!

Dan Rak.